

Svisa Esperanto-Societo

# informas

jaro 2008 numero 4-a: novembro-decembro  
dissendo je la 1-a de novembro



Fotis Claude Gacond

Sur kajo de la Retia Fervoja Linio inter Thusis kaj Tirano.



# Rememorigilo

## *SES informas*

### Redakcio :

Claude Gacond, CP 480,  
CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : gacond@bluewin.ch

Tel. : hejme: 032 926 52 32  
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy Fontannaz, Stefano Keller,  
Richard Schneller

## *SES informas*

### Redaktaj datlimoj

**2009-1 : januaro-marto :**

januare 10, dissendo 1-a de februaro.

**2009-2 : aprilo-junio :**

aprile 10, dissendo 1-a de majo.

**2009-3 : julio-oktobro :**

aŭguste 10, dissendo 1-a de septembro.

**2009-4 : novembro-decembro :**

oktobre 10, dissendo 1-a de novembro.

**Konsultu la retejon de SES !**

[www.svisa-esperanto-societo.ch](http://www.svisa-esperanto-societo.ch)

## SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto,  
Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel. :  
076 261 06 09.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, PF  
301, 8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25.

Retpoŝto : info@esperanto.ch

Stefano Keller, sekretario, CP 6034,  
1002 Lausanne. Tel.: 076 261 06 09.

Retpoŝto: stefano.keller@kontakto.info

Hans-Werner Grossmann, kasisto,  
Esperanto-Servo, PF 262, 4132  
Muttenz 1. Tel.: 076 460 89 92.

Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Poŝta ĉekokonto :

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo

2300 La Chaux-de-Fonds

## Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	



# Vivo de SES

2008-4 - Redaktis: Stefano Keller

## **1. Resuma raporto pri la Estrarkunsido de Svisa Esperanto-Societo, okazinta en Bielo, la 6-an de septembro 2008**

Dum sia kunsido la estraro de SES: Mireille Grosjean (kunprezidanto), Dietrich Weidmann (kunprezidanto), Hans-Werner Grossman (kasisto) kaj Stefano Keller (sekretario) diskutis, decidis pri jenaj temoj:

### ***Konkurso Esperanto***

La estraro gratulas la organizintojn de la konkurso (La Stelo, en Ĝenevo) kaj taksas tre pozitiva la rezultojn. La evento tre bone servis kiel varbado, informado pri Esperanto. Konsekvence, en 2009, SES organizos similan konkurson pri Esperanto. Legu apartan alvokon pri ĝi en artikolo de Mireille Grosjean.

### ***Aktivecoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj, en Ĝenevo***

La sekretario de SES, Stefano Keller estas unu el la komisiitoj de UEA ĉe UN en Ĝenevo. Li jam aktivis en la organizado de la tie okazinta Simpozio pri lingvaj rajtoj (2008-04-24). En septembro li partoprenis kun Charmian Common la Socian Forumon de la Homrajta Konsilio kaj la 9-an Sesion de la Homrajta Konsilio mem. Raportoj pri la UEA-intervenoj ĉe UN en septembro 2008

jam aperis en la esperanta gazetaro kaj en diversaj retejoj :

[www.youtube.com/esperantotv](http://www.youtube.com/esperantotv)

La estraro de SES atente sekvas la eventojn ĉe UN kaj subtenas la agadon de UEA pri lingvaj rajtoj, kunlabore kaj, laŭokaze, finance. Pri tiu agado informas la retejo: [www.lingvaj-rajtoj.org](http://www.lingvaj-rajtoj.org)

### ***Perspektivoj de CDELI,***

#### ***La Chaux-de-Fonds***

SES deziras firmigi siajn rilatojn kun la gvidantaro de la Biblioteko de La Chaux-de-Fonds, cele al subteno de la estonta disvolviĝo de la laboro de CDELI. Por tion atingi kaj daŭre certigi, baldaŭ okazos kunsido inter la SES-estraro, la aktualaj kunlaborantoj de CDELI kaj la direktoro de la Biblioteko de La Chaux-de-Fonds. Intertempe oficiale fondiĝis asocio de la ***Amikoj de CDELI***, iniciato de Claude Gacond, kaj de liaj 12 kunlaborantoj en CDELI. Pli da informoj pri la asocio aperos en: [www.cdeli.org](http://www.cdeli.org)

***Mireille Grosjean, kun-prezidanto de Svisa Esperanto-Societo,*** partoprenis la ILEI-Konferencon en



Benino. Ŝi estis elektita konsilanto de la Afrika Komisiono de UEA.

### **Ĝenerala Kunveno de SES 2009**

La estraro decidis pri la venonta Ĝenerala Kunveno de SES: ĝi okazos en CDELI, La Chaux-de-Fonds, sabate, la 16an de majo 2009. Programo antaŭvidata: la Ĝenerala Kunveno disvolviĝos dum la mateno, kultura programero estas organizota fare de la kunlaborantoj de CDELI por la posttagmezo. Detalaj informoj aperos en SES informas, 2009-1.

### **Plilarĝigo de la Estraro**

Nelida Weidmann estis alelektita kiel kvina membro de la estraro de Svisa Esperanto-Societo.



### **Konkurso Esperanto 2009**

La Stelanoj en Ĝenevo povis fari iun varbadan agadon en 2007. Ili elpensis konkurson por junuloj. La celo estis montri, kiom rapide oni povas lerni Esperanton. Dekoj da junuloj eklernis nian lingvon. Ĉe la fino de kvarmonata lernotempo okazis ekzamenoj. Tio estis en marto 2008.

Tie ni renkontiĝis kun 16 junuloj, inter kiuj estis elstaraj personoj. Grandega sukceso. SES gratulas la Ĝenevanojn de la grupo *La Stelo*, kaj la gajnintojn.

Tuj venis propono, ke SES faru denove tian agadon. Do, la estraro

pripensis pri organizo de tia agado. La strukturo estos proksimume la sama. Venos nova kalendaro dum la jaroj 2008 kaj 2009. Ĉar ni antaŭvidas grandan sukceson, ni devas nun ekplani. Do, nia kalendaro estas: Ĝis fino de decembro 2008 ni klopodas trovi financan subtenon. La anoncoj aperos en februaro 2009. La aliĝoj devos atingi nin ĝis aprilo 2009. La ekzamenoj okazos en oktobro 2009. Ni jam ricevis donacopromeson. Ĉu vi same deziras subteni tiun agadon? Kaze ke jes, bv. kontakti [ses@esperanto.ch](mailto:ses@esperanto.ch) aŭ iun el la estraro, telefone, antaŭ jarfine. Laŭ la rezultoj de tiu ĉi alvoko, ni povos plani pli oftan kaj/aŭ pli grandan anoncon pri la konkurso en ĉiutagaj senpagaj gazetoj. Sed la anoncoj ne estas senpagaj, male...!

*Mirejo Groĵan el sia vojaĝo en Azio tra Koreio kaj Japanio:*

<http://mirejo.blogspot.com>



*Mirejo kun Mikaelo en Koreio*



## ***2. Donacoj ricevitaj: aŭgusto-septembro 2008***


### ***Entute 220.- svisaj frankoj:***

(5.00) S-ino Georgette Gausen, Les Moulins ; (20.00) S-ino Agnès Huguenin, La Chaux-de-Fonds ; (20.00) S-ro Noël Huguenin, La Chaux-de-Fonds ; (50.00) S-ino Heidi Isaak, Adligenswil (por la Enciklopedio) ; (25.00) S-ro Hans Meier, Basel ; (5.00) PARZIVAL, Biel ; (30.00) S-ro Daniel Ruchti, Weissenburg ; (50.00) S-ro Erich Werner, Hochdorf ; (15.00) S-ro Armin Weidmann, Uerikon. Dankon al ĉiu donacinto.



### ***Jen kiel Mireille Grosjean rakontas sian alvenon en Koreio:***

*Hodiaŭ la 16-an de septembro mi atingis Koreion post senproblema flugo. Mi estis akceptita de Mikaelo kaj Blua (junaj esperantistoj el Seulo) en la flughaveno de Seulo Incheon. Poste mi estis en Kultura Centro Esperantista de Seulo, kie mi vidis mian kolegon **Lee Jung Kee, prezidanto de Komisiono por Azia Esperanto Movado (KAEM) de UEA** (sur la bildo). Mi konatiĝis kun li en La Chaux-de-Fonds komence de la naŭdekaj jaroj kaj mi vidas lin regule. Li organizis mian monaton en Koreio. Mi jam vizitis multon en la urbo.*



<http://mirejo.blogspot.com/2008/09/arrivee-en-coree-alveno-al-koreio.html>



# Tutsvisa aktiveco

## Tago honore al Claude Piron

Urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds

15-an de novembro 2008

Nia kara kaj altestimata samideano Claude Piron forpasis subite en januaro 2008. Tio estis grava ŝoko kaj tristeco por ĉiuj.

Tial Svisa Esperanto-Societo, CDELI kaj la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds deziras memori lian personecon kaj lian verkaron. Ĉiuj liaj amikoj, lernantoj, legantoj kaj ŝatantoj estas invitataj kunveni en La Chaux-de-Fonds omaĝe al li la sabaton 15-an de novembro.

Interalie parolos Anita Altherr, Mario Bélisle, Bruno Graf, Stefano Keller kaj Claude Gacond kaj kantos Olivier Tzaut. Projekciiĝos filmo de Francisko Randin kaj aŭdiĝos radio-intervjuo.

### Horaro :

Ekde la 10.00 : **Alvena akcepto en la CDELI-salono** ĉe la 2-a etaĝo de la biblioteko kun amika kafumado, aĉeteblos libroj de Claude Piron kaj de aliaj verkistoj.

**11.00 : Salutoj kaj enkondukaj vortoj de Anita Altherr** kaj kuna iro al la biblioteka filmejo por spekti filmojn pri Claude Piron realigitajn de Francisko Randin.

**11.15 ĝis 12.45 : En la biblioteka filmejo** projekciado de la filmoj de Francisko Randin.

12.45 : Irado al la restoracio.

**13.00 : Komuna tagmanĝo** en najbara picejo.

**14.30 : En la biblioteka salono Charles Humbert** : Biografiaj notoj de Anita Altherr pri Claude Piron kaj mesaĝoj de Bruno Graf, Stefano Keller, Mario Bélisle kaj Claude Gacond, kiu aŭdigos radio-intervjuon kun Claude Piron, la tuto

akompanata de kantoj de Olivier Tzaut.

**15.45** : Supreniro al la CDELI-salono por **konkludaj vortoj** de Anita Altherr kaj Claude Gacond. Kaj poste ĝis la 17.00 eblos plue resti en CDELI por teumi, diskuti kaj aĉeti librojn novajn kaj brokantajn.

**Aliĝo** : Kvankam ne estos petita aliĝa kotizo, ĉiuj tamen bonvolu anonci sian aliĝon **nepre ĝis la 10-a de novembro** al Nancy Fontannaz : ĉu telefone : 021 728 31 27 (kun respondilo), ĉu rete :

[nancy.fontannaz@gmail.com](mailto:nancy.fontannaz@gmail.com)

### Atentige :

Busa veturo al la biblioteko : Buslinio 4, direkto *Hôpital*, haltejo *Bibliothèque*. Bileto aĉeteblos ĉe la stiristo de la buso.

Eksterhora alveno post la 11.00 : Anoncu vin ĉe la ĝiketo *Information* de la biblioteko.



# CDELI

## Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia

Bibliothèque de la Ville, Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds

Tel. : 032 967 68 42.

Retadresoj : [claude.gacond@ne.ch](mailto:claude.gacond@ne.ch), [martine.schneller@ne.ch](mailto:martine.schneller@ne.ch), [nancy.fontannaz@ne.ch](mailto:nancy.fontannaz@ne.ch)

## Venontaj stud-aranĝoj !

**Didaktika stud-sabato** okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Instruas Monika Molnar, Claude Gacond, Nancy Fontannaz kaj Luc Allemand. Rezervu la sekvajn sabatojn : **2009 januare 17, februare 21 kaj marte 21.**

**Kultura seminario** okazas principe la unuan sabaton de la monato en neferia periodo. Rezervu la sekvajn sabatojn : **decembre 6, 2009 februare 7 kaj aprile 4.** La studo-temo estos la novelarto en esperanto.

Studemuloj nepre rezervu tiujn ĉi datojn en sia agendo.

## Horaro de ambaŭ aranĝoj

10.00 : Malfermo, eblo aĉeti librojn, babili kaj kafumi.

**10.45 : Oficiala malfermo**, formiĝo de la stud-rondoj. 11.00 : Studo.

11.45 : paŭzo. 12.00 : Studo. 12.45 : foriro al tagmanĝo. 14.15 : Studo. 15.00 : paŭzo. 15.15 : Studo. **16.00 : Konkludo** kaj teumo, librovendo. **17.00 : Oficiala fermo.**

Aliĝo : Por faciligi la organizon de la studaj kaj seminariaj sabatoj **ĉiu bonvolu nepre anonci sian partoprenon almenaŭ ĝis la ĵaŭdo unu semajnon antaŭ la koncerna aranĝo al Nancy Fontannaz : telefone : 021 728 31 27 (kun respondilo) aŭ rete :**

**[nancy.fontannaz@gmail.com](mailto:nancy.fontannaz@gmail.com).**

**Partopren-kotizo** : Por minimuma kovro de la elspezoj la partoprenkotizo estas po Fr. 15.- por partopreno en la stud-sabato (senpage por studentoj) kaj po Fr. 20.- por partopreno en la sabata seminario (duonpreze por studentoj). **Plusa pago de Fr. 5.- estos petita de tiuj, kiuj ne akurate anoncis sian partoprenon almenaŭ unu semajnon antaŭe.**

## Fondo de Esperanto-Amikaro de CDELI kadre de Association des Amis du CDELI

Kiuj oktobre partoprenis la prelegajn tagojn de André Cherpillod, ĉu esperantlingve sabate 11-an en CDELI, ĉu franclingve dimanĉe 12-an en La Vue-des-Alpes, tiuj estis informitaj pri la kreo de *Association des Amis du CDELI*, en kiu la poresperanta aktiveco estas statute registrita en faka organo de la Asocio sub la nomo Esperanto-Amikaro de CDELI. Ĉiuj partoprenantoj al la aranĝo de la



11-12-aj de oktobro ricevis la franclingvan statuton de tiu asocio. Tiu statuto inspiriĝis de tiu de la *Association des Amis de la Bibliothèque de la Ville de La Chaux-de-Fonds*. Efektivigis tiun redaktan laboron Claude Gacond, Nancy Fontannaz kaj Martine Schneller kun la juristino Sonia Bétrix. Ĉiuj estas regulaj kunlaborantoj de CDELI. Tiu statuto jam rete konsulteblas sub [www.CDELI.org](http://www.CDELI.org) dank'al la kunlaboro de Stefano Keller.

Tre baldaŭ, espereble jam en novembro, pere de la kunlaboro de SES kaj espereble de aliaj esperanto-organizaĵoj, la svisa esperantistaro perpoŝte ricevos tiun statuton kun esperantlingva traduko kaj instigon listiĝi inter la Amikoj de CDELI. La jara kontribuo por fariĝi Amiko de CDELI estas svisaj Fr. 30.- aŭ € 20.- Ĝi samas al la kotizo de la Amikoj de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds.


Por firmigi la rilatojn inter SES kaj CDELI estas antaŭvidite, ke la unua Ĝenerala Asembleo de la Asocio *Les Amis du CDELI* okazos la vendredon 15-an de majo en la franca lingvo kun reprezentantoj de la Biblioteko. Kaj la sekvan tagon, do je la sabato 16-a de majo, okazos en esperanto la unua Asembleo de la Esperanto-Amikaro de CDELI, tio sekve al la Ĝenerala Kunveno de SES. Pri tio aperos detala informado en la venonta bulteno *SES informas 2009-1*.

Ni konkludas tiun informadon atentigante pri la celo mem de CDELI, kiu estas rememorigita en la artikolo 2-a de la statuto de la ĵus fondita Asocio de la Amikoj de CDELI: „*Traserĉi, konservi, valorigi kaj esplori verkojn en rilato kun internaciaj lingvoj. Proponi laborilojn kaj konilojn al esplorantoj el la tuta mondo kaj el ĉiuj interlingvaj komunumoj.*“ Kaj, koncerne al la statuta artikolo 16-a punkto 1-a, la rolo de la Esperanto-Amikaro de CDELI estas tiel precizigita: „*La Amikoj esperantlingvaj de CDELI (esperante: Esperanto-Amikaro de CDELI) alportas sian apogon al la Asocio koncerne al esperanto. En rilato kun la esperantlingvaj asocioj kaj eldonejoj kaj kun korespondantoj, ili laboras al la riĉigo de la kolektoj de CDELI. Per libro-servo kaj organizo de kursoj, seminarioj kaj kolokvoj ili alportas sian didaktikan apogon al la publiko studanta kaj praktikanta esperanton kaj kontribuas al la kultura radiado de CDELI je la regiona nivelo kaj en la esperanto-mondo. Tiuj aktivecoj disvolviĝas normale en esperanto kaj ofte interrete. Sed la agadraportoj al la Ĝenerala Asembleo estas prezentataj franclingve.*“

Certe la ekzisto de Esperanto-Amikaro de CDELI kontribuos al la firmigo de la rilatoj inter CDELI kun la esperanto-organizaĵoj kaj ankaŭ inter CDELI kun la publikaj institucioj. Tial espereble viglos apogo de la esperantistoj kaj esperantaj medioj al tiu nova kaj certe bezonata asocio.

-oOo-





# Loka vivo

## Basel

**Esperanto-Societo Basel**  
PF 103, 4005 Basel  
Tel. : 0049 76 214 57 12.  
Kunvenoj : 20.00 en la kelo de la  
malantaŭa domo, Riehenring 129.

## Genève

**Esperanto-Grupo „La Stelo“**  
Case postale 734, 1212 Grand-Lancy 1  
Espéranto-infos : Tel. : 022 740 04 45.  
La kunvenoj okazas en Maison des  
Associations, rue des Savoises 15.

### Venontaj kunvenoj

**Novembre 27:** Pretigo de la  
programo 2009.

**Decembre 13:** Zamenhofa festo en  
Riehenring 129.

**Antaŭoficiala parto:** ekde la 10.00  
kun vizito de la urbo kaj de la best-  
ĝardeno.

#### **Oficiala parto:**

15.00: Kafumado.

16.00: Prelego de Andreas Künzli  
pri Esperanto kaj Hector Hodler.

17.30: Interkonatiĝo.

18h.00: Vespermanĝo: Rakledo kaj  
deserto.

20.00: Vespera programo.

21.00: Fino de la oficiala parto. Plua  
resto eblas.

**Por aliĝi:** adreso de la societo aŭ  
[focke-inzlingen@t-online.de](mailto:focke-inzlingen@t-online.de)

-oOo-

-oOo-

## Lausanne

#### **Laŭzana Esperanto-Societo**

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel: 021 657 14 56

[esperanto@isuisse.com](mailto:esperanto@isuisse.com)

<<http://www.esperanto.ch/Lausanne>>

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun  
unuan lundon de la monato je la 20.00.

### Venontaj kunvenoj

**Decembre 13:** La Zamenhofa Festo  
malfermiĝos je la 11.00 en *Maison  
de quartier sous gare*, Av. Dapples  
50, 1006 Lausanne. La manĝo, kiu  
estos mendita al restoraci-majstro,  
kostos po Fr 15.- por persono. Ĉiu  
pluse alportu trinkaĵon kaj deserton.  
Aliĝo tra la kasistino Sonia  
Daubercies, tel. 079 649 88 86.



**2009 januare 5** : Benno Frauchiger prelegos pri sia bicikla ĉirkaŭiro tra la mondo.

**Februare 2** : Ĝenerala asembleo.

**Marte 2** : Projekciado de kelkaj filmoj NANDIR, ekzemple de la plej freŝdata: *La Patrolo de la Glaciejo*.

**Aprile 6** : Decidote.

**Maje 4** : Decidote.

-oOo-

## Raportoj

### Hori Jasuo el Japanio prelegis en Etoy Rakontas Elisabeth de Mestral



Fotis Elisabeth de Mestral.

En aprilo ni plezure ricevis la afablan viziton de Hori Jasuo, japana verkisto, emerita profesoro pri la angla kaj membro de la komitato de UEA.

Kadre de diversaj prelegoj en Francio li restadis dum kelkaj tagoj ankaŭ en Romandio. Li kaj lia amiko Bin multe ŝatis nian landon, mal-

kovrante bicikle nian lemanan lagon kaj Laŭzanon. Ili ŝajne preferis bonajn vinojn, ol teon !

En la moderna subtegmenta salono de la komunumo Etoy kuniĝis kelkaj esperantistoj, kiuj travivis interesan, gajan kaj ridan vesperon kun tri temoj :



## La japana lingvo

La japana skribo entenas ĉefe 3 erojn, kiu estas :

- la ĉinaj karakteroj (kiujn la japanoj prononcas alimaniere, ol la ĉinoj),
- la katakana silabaro por skribi eksterlandajn nomojn,
- kaj la hiragana silabaro por skribi la vort-finaĵojn. Ili indikas ankaŭ la prononcon.

Tiuj 2 silabaroj ebligas ankaŭ noti la aron de la sonoj de la japana lingvo.

Apartaĵo estas, ke la distingo inter la sonoj R kaj L ne ekzistas en la japana lingvo.

Skribiĝas la japana lingvo sen spaco inter la vortoj, vertikale kaj de dekstro al maldekstro.

Hori Jasuo instruis kaj invitis kelkajn skribi vortojn sur tabuletoj pere de penikoj kaj inko... ne facila tasko!

### Artikolo 9a de la 2a ĉapitro de la Japana Konstitucio de 1947 : Rezigno pri milito

1) *La japana popolo, sincere dezirante internacian pacon bazitan sur justeco kaj ordo, por ĉiam rezignis militon kiel rimedon de ŝtatpotenco kaj minacon per armforto aŭ ties uzon por solvo de internaciaj konfliktoj.*

2) *Por realigi ĉi tiun celon ĝi neniam posedos teran, maran, aeran kaj aliajn militpovojn. Ĝi ne agnoskos la militrajton de la regno.*

Ekde 1931 sub la influo de la imperiestro Ŝowa (Hirohito), la armeo invadis Manĉurion (granda teritorio en sud-oriento de Ĉinio) kaj

Ĉinion en 1937. Intertempe komenciĝis la dua mondmilito.

En 1940 kreiĝis la politika alianco «Akso Berlino - Romo - Tokio». Por historia memoro : tio signifas, ke la nazia Germanio, la faŝisma Italio kaj la imperiestra Japanio kunigis siajn fortojn.

En 1941 Japanio atakis la usonan militbazon de Pearl Harbor kaj ankaŭ invadis Malezion, Indonezian, Papuazian, ktp... kaj finfine deklaris militon kontraŭ tuta Azio. Japanio estis venkita en 1946, kiam la usona armeo uzis kontraŭ ĝi nukleajn bombojn.

En 1947 nova konstitucio estis adoptita kaj en ĝi troviĝas la ĉi-supra artikolo 9a, kiu estas ekzemplo de paco por multaj. Fakte la japana registaro promesis ne plu havi armeon. Tamen, por agnoskiĝi en la internacia politika scenejo, ĝi havas ne-oficialan armeon, kiu nomiĝas « sin-defendaj fortoj ».

Hodiaŭ kelkaj politikistoj ŝatus, ke tiu artikolo malaperu de la konstitucio por ebligi al Japanio rekonstrui armeon. Aliaj, inter kiuj Hori Jasuo, batalas por konservi tiun artikolon, kiu estas bela ekzemplo de invito al paco por la tuta mondo.

### Prezentado de diversaj raraj aziaj muzikiloj

Ni vojaĝis helpe de diversaj strangaj, stridaj, dolĉaj, pompaj sonoj de nekutimaj aziaj muzikiloj.

Hori Jasuo travivigis al ni memorindan momenton, kiam li montris al ni tiujn muzik-diversaĵojn. Ili estas :  
- cigala bastoneto,




- ligna muzikludilo el Tailando en formo de akordiono kun birda kapo,
- kantanta bovlo, el kiu nur honestaj homoj povas eltiri sonojn (kelkaj el ni provis foje sukcese, foje ne...),
- sankta ilo el Tibeto farita el homa femuro kaj ornamita de turkisoj kaj arĝento. Ĝian odoron li flarigis al ni,
- ligna nazmuzikilo, kiu ŝajne konvenas nur al la plataj aziaj nazoj. Fakte kiuj provis enblovi pere de niaj pintaj eŭropaj nazoj, tiuj pli nazpuriĝis enen, ol muzikis !



Fotis Elisabeth de Mestral.

Jasuo ludis per granda ruĝa kaj flava ornamita korno el Tibeto kaj eligis el longa ligna fluto belan, meditan kanton, kies aziaj harmonioj ŝvebis longe sur la asembleo.



Fotis Elisabeth de Mestral.

Por kontrasti Hori ludis ankoraŭ la « *Himnon al la ĝojo* » de Beethoven pere de moderna plasta botelo plenigita de akvo ! Fine li invitis la partoprenantojn mimi kaj ĉen-kanti « *sub la granda pomarbo, mi, vi, ŝi, ludu ni* ».

Por ĉiuj, kiuj deziras malkovri Japanion, endas legi la verkojn de Hori Jasuo « *Raportoj el Japanio* ». Jam 10 raportoj estas eldonitaj kaj la lasta 11a ĵus nun aperis. Vi malkovros multajn rakontojn pri diversaj interesaj temoj, inter kiuj: vivmanieroj, politikaferoj, ekologiaj problemoj, edukadsistemo, travivaĵoj, klimato, muziko, ktp... Lia stilo estas tre flua, humura, neniam teda. Ili retmendeblas ĉe UEA.

-oOo-

## Prelego pri esperanto en la maja asembleo de la Juda Ina Familia Help-asocio.

Kiam la sekretariino de la Juda Ina Familia Help-asocio petis al Elisabeth de Mestral veni prelegi pri esperanto dum la maja ĝenerala asembleo de tiu organizaĵo, tute kompreneble Elisabeth zorgis doni

bonajn kaj ekzaktajn informojn. Tiam ŝi sin demandis, ĉu esperanto reale povas interesi tiun publikon kaj kiajn rilatojn la svisaj judoj havis kun esperanto? Kaj ŝi sentis la bezonon informiĝi pri la juda



situacio de Zamenhof mem. Do, kion fari? Ŝi interalie dokumentiĝis per legaĵoj kaj tra la kanalo de CDELI.

Kaj tiel dank'al ŝi ĉirkaŭ 50 partoprenantoj de la anoncita kunveno kun granda intereso povis intimiĝi kun la neordinara personeco de Zamenhof, pri liaj konoj prilingvaj, lia genio, liaj esploroj kaj klopodoj, lia strebado al pli da justeco en la mondo, kaj ankaŭ en kia politika, socia kaj streĉa kunteksto li naskiĝis kaj evoluis.

Ŝi rakontis, kiel en 1887, helpe de siaj edzino kaj bopatro, Zamenhof eldonis proprakoste en la rusa lingvo sub la pseŭdonimo Doktoro Esperanto sian projekton de *Lingvo internacia*, kiu entenis:

- enkondukon pri la lingvo,
- 16 gramatikajn regulojn,
- 920 bazajn radikojn ĝenerale komunajn al niaj eŭropaj lingvoj.
- 3 poemojn, kiujn li mem verkis.

Ŝi raportis pri la traduko de tiu broŝuro en la polan, germanan, francan kaj anglan kaj atentigis pri la tiama problemo por Varsoviano diskonigi ĝin. Tiam neniu retejo aŭ blogo ekzistis por faciligi informadon! Ŝi atentigis la judajn aŭskultantojn, ke interalie Zamenhof dissendis sian broŝuron en la tutan mondon tra la judaj komunumoj. Li adresis siajn pakaĵojn *Al la rabeno de la sinagogo...* aldonante nomon de urbo. Ŝi donis la konatan ekzemplon de La Chaux-de-Fonds. Kiam tiel en 1887 la rabeno de la sinagogo de La Chaux-de-Fonds anoncis la alvenon de pakaĵo el Varsovio kun 5 ekzempleroj de broŝuro *Lingvo internacia* de iu

Doktoro Esperanto, tiam Philidor Wolf esprimis sian intereson. Li ne nur tuj lernis la lingvon, sed ankaŭ instruis ĝin al sia filo Jules, kiu poste fondos la lokan esperanto-grupon en 1903. Kaj Mathilde, la edzino de Jules, eĉ verkis teatraĵon, kiu estas titolita « *Patreco* », kiun oni ludis en tiu urbo kaj ankaŭ en Universala Kongreso en Berno. Philidor Wolf fakte inspiris la esperantaj nomojn *Movado, Rado, Eterna, Universo* al judaj kolegoj serĉantaj nomon por sia horloĝ-firmao.

Elisabeth de Mestral prave atentigis, ke Zamenhof ankaŭ kontaktis aliajn mediojn por diskonigi sian lingvon kaj ŝi rakontis, kiel esperanto disvolviĝis, menciante, ke post la sukceso de la unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905 en Boulogne-sur-Mer, la dua kongreso okazis en Ĝenevo kaj estis ĉefe organizita de Hector Hodler, la filo de nia fama svisa pentristo Ferdinand Hodler.

Pri la sekvo de la prelego, jen kiel Elisabeth de Mestral mem raportas:

### **Esperanto transiris malfacilaĵojn.**

Dum la unua monda milito pereis triono de la esperantistoj kaj en la jaro 1917 mortis Zamenhof pro malsano. Tiu periodo estis tre malĝoja, sed esperanto jam estis kiel juna sed fortika planto kun jam profundaj radikoj. Ĝi pludaŭris.

En 1930 sub la komunista regado de Lenino en Ruslando esperanto unue estis konsiderata kiel bona komunikilo inter la laboristoj sed subite oni malpermesis ĝin. Multaj esperantistoj estis persekutitaj, ĉar la



registaro akuzis ilin uzi la cionisman kaj burĝan tutmondan lingvon.

En 1945 dum la dua mondmilito en Germanio esperanto estis konsiderata kiel komunisma kaj juda lingvo. Sub tiu politika kaj terura reĝimo multaj esperantistoj estis mortigitaj.

Hodiaŭ oni povas ĝoji, ke esperanto kiel granda ŝipo transirinte ŝtormegojn plu vivas...

### La strukturo de la lingvo

La ĉeestantaro malkovris la rilaton inter kelkaj diversaj radikoj de niaj eŭropaj lingvoj - komparon inter la latina - franca - itala - hispana - portugala - germana - angla kaj rusa. Multaj miris pri la simileco inter la vortoj. Mi elĉerpis ekzemplojn el la « *Naŭlingva etimologia leksikono* » (instrua libro por homoj, kiuj ŝatas lingvojn) de Louis Bastien.

Ili lernis kiel konstrui substantivon, adjektivon kaj verbon el unu radikoj, kompare al diversaj radikoj, kiujn oni devas lerni en la franca. Ili ludis vortfarante kun diversaj afiksoj kaj kunmetaĵoj.

### Esperanto hodiaŭ

La ĉeestantaro surpriziĝis pri la hodiaŭa vivo de esperanto. Tio estas: multnombraj kongresoj, kiuj okazas en la mondo, eldonoj de libroj, ĵurnaloj, vojaĝaj facilecoj dank'al la *Pasporta servo*, ebleco malkovri facile diverslandajn kulturojn, aŭskulti diversajn muzikajn grupojn, amikumi kun multaj personoj, la miloj da informoj, leteroj, mesaĝoj, kiuj sendiĝas ĉiutage pere de interreto.

Post la prelego multaj entuziasmiĝis pri esperanto, kelkaj petis informojn por lerni la lingvon, kelkaj bedaŭris esti iomete tro aĝaj por eklerni ĝin. Du personoj parolis ankaŭ pri siaj spertoj en Bulgario kaj Jugoslavio: ĉirkaŭ la jaroj 1930-40 judaj komunumoj unue subtenis esperanton sed poste, kiam multaj judoj foriris Israelen, rabenoj konsilis al ili lerni la jidan kaj la hebrean anstataŭ esperanton, tio por ke la juda popolo ne perdu sian identecon. Tiuj 2 personoj do forlasis esperanton pro tio.

### Konklude

Konklude al sia preleg-raporto Elisabeth de Mestral skribis sian plezuron pri la preparo kaj prezento de tiu laboro. Kaj al ĉiuj, kiuj dezirus scii pli pri la vivo de Zamenhof, ŝi konsilas la tre belan biografion: « *La homo, kiu defiis Babelon* » de René Centassi kaj Henri Masson (*L'Harmattan*) – skribita ankaŭ en la franca sub la titolo: « *L'homme qui défia Babel* ». Tiu pasiiga romano, ŝi diras, malkovrigos al vi, kiel Zamenhof konstruis la lingvon, liajn grandajn konojn en multaj fakoj, kiel li sciis transiri malfacilaĵojn kaj la grandan humanecon de tiu genio. Kaj ŝi konkludas: *Oni voras tiun libron kiel freŝan paneton ĵus eltiritan el la forno!*

-oOo-



# Luzern

## Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj :

Restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke.

Restoracio Bellini (hotelo Continental-Park), Murbacherstr. 4. Tel.: 041 228 90 50

Ĉe gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. Tel. : 041 210 25 88.

## Venontaj kunvenoj

**Novembre 12** : Restoracio Bellini  
14h00-16h00: Konversacia rondo  
kun Sonja Brun.

**Decembre 10** : ĉe ges-roj Anna &  
Koni Rey 14h00: Zamenhofologio  
kaj programo 2009 kun Paul  
Scherer.

**2009 januare 7** : Restoracio Bellini  
14h00-16h00: Konversacia rondo  
kun Sonja Brun.

## Raporto pri interesa prelego de Koni Rey

La merkredon 11-an de junio Koni Rey prelegis pri la temo *Henry Dunant – samtempulo de L. L. Zamenhof*. Tutcerte lia parolado indas publikigon, kiun ni realigas ĉi-bultene en la lucerna rubriko, kun espero, ke aliaj grupanoj ankaŭ profitos pri ĝi. Tiu publikigo instigu aliajn al diskonigo de siaj prelegoj okazintaj en loka grupo. Konklude al sia raporto pri la vivo de Henry Dunant Koni Rey dankis al Sonja Brun pro ŝia helpo per lingvaj konsiloj. Ankaŭ tia redakta kunlaboro estas imitinda. Ĝi estas kuraĝiga por tiuj, kiuj timas ne plene regi la lingvon.

Claude Gacond.

## Henry DUNANT samtempulo de L. L. ZAMENHOF prelego de Koni REY

### Pri la gepatroj

La fraŭlo Jean-Jacques DUNANT (1789-1875) okupiĝis dum 20 jaroj kiel memstara komercisto, plej parte eksterlande. Li establis sin en Marseille, de kie li faris multe da komercvojaĝoj tra Eŭropo, kiuj kondukis lin en la haven-urbojn Cádiz, Palermo, Londono, Amsterdamo kaj eĉ transoceanen. Reveninte Ĝenevon li edziĝis 38jaraĝa (1827)

kun Anne-Antoinette COLLADON 1801, filino el konata familio de profesoroj, pastroj, juristoj kaj sciencistoj. Granda parto de sia libera tempo ŝi dediĉis al pieco kaj bonfaraĵoj.

En Ĝenevo Jean-Jacques apartenis al la „*Conseil Représentatif*“, kiu tiam estis la leĝdona estraro de la Respubliko. Samtempe li estis membro de la kuratora ĉambro.



## Lernado al proksimula amo

Henry naskiĝas la 8-an de majo 1828 en Ĝenevo. Jen liaj gefratoj: 1829 Sophie-Anne, 1831 Daniel, 1833 Marie kaj 1834 Pierre-Louis.

Henry estas sentema infano. Atente li observas malriĉecon kaj aflikton. Ofte li akompanas la patrinon por viziti malsanulojn kaj malriĉulojn kaj por donaci iomete da mono aŭ laŭtlegi al ili el la Evangelio.

La familio vojaĝas en la jaro 1836 al Marseille kaj Toulon, kie la 9-jara Henry indignas pri la malhumanaj, ja eĉ barbaraj situacioj kaj fartoj en la prizonoj.

La juneco de Henry, kiel li skribas en siaj memoroj, estas feliĉa, malgraŭ ke lia patro ofte estas ekster la hejmo kaj la urbo pro komercaj aferoj.

«*En la aĝo de dek jaroj*», li skribas, «*estis mi eta aristokrato el la plej prestiĝa parto de la aristokrataro*».

Ekde 1838 (dek-jaraĝa) Henry frekventas la liceon “*Collège CALVIN*”. Li estas mezbona lernanto kaj eĉ devas ripeti unu jaron. Krom “religio” li en neniuj alia fakoj elstaras kaj ne finas la gimnazion. Sed li multe legas kaj interesiĝas pri la multnombraj ĝenevaj societoj, prefere pri la sciencaj kaj religiaj.

1849 Henry eklernas ĉe la banko-domo “*LULLIN et SAUTTER*” la metion de komercisto. Ekde la sama jaro li renkontiĝas ĉiujn jarojn kun kelkaj kamaradoj de la «Almozo-societo». Aŭ hejme aŭ en ĉambro de la Evangelia Societo okazas vesperaj bibliaj diskut-rondoj. Ĉi tiu societo ricevas la nomon «Societo de Junaj

Kristanaj Viroj». Henry estas organizanto kaj stimulantulo en unu persono. Laŭ la vortoj de kamarado, li kapablas: *religi distranĉitajn ligojn, revenigi dubulojn, kuraĝigi malfortulojn kaj entuziasmigi hezitulojn*.

Tiel la ĝeneva “Societo de Junaj Kristanaj Viroj” restas – dum pluraj jaroj – renkontejo kaj informejo.

## La tempo de la komercaĵoj

Henry vojaĝas. Li vizitas Alsacon, Belgion, Nederlandon kaj Francion. Li skribas multon kaj dediĉas ĉiun minuton, kiu estas al li permesata apud la laboro de komercisto – al la misio de la Junaj Kristanaj Viroj.

En la aĝo de 25 jaroj turnas sin paŝo el la vivo de Henry. La junulo maturiĝis al plenkreskulo. Li decidas partopreni kaj kunlabori en kolonioj. La ĝenevaj financuloj flaras profitdonajn komercojn en Afriko. La honesta filo de komercisto volas ĉion efektivi, kion li lernis en la kontoroj de Ĝenevo.

En la firmao “*LULLIN et SAUTTER*”, en kies deĵoroj Henry, en la jaroj 1849 kaj sekvaj, eklernis la komercarton, li renkontis du respondeculojn de la ĝeneva «*Compagnie des Colonies suisses de Sétif*». Ĉi tiu ligo kondukos lin je ĉirkaŭvojo al Solferino, kaj markos la elirpunkton de mallonga, sed decidiga kaj okazo-riĉa parto de lia vivo.

En la tempospaco de nur dekdu jaroj Henry fondas la Societon de la Junaj Kristanaj Viroj (1852), estas decida partoprenanto ĉe la starigo de la Monda Unuiĝo de la Societo de Junaj Kristanaj Viroj (1855),



konfrontiĝas kun la batalokampo de Solferino (1859), publikigas sian ĉefverkon «*Un souvenir de Solférino*» (1862) kaj agas por la subskribado de la Ĝenerala Konvencio de 1864, el kiu efektiviĝos la Ruĝa Kruco.

La ĝeneva «*Compagnie des Colonies suisses de Sétif*» ĵetas sin en ambician projekton sen esti influata de la fakto, ke antaŭe aliaj svisaj komercistoj pli aŭ malpli malsukcesis.

Do, en 1853 Henry estas la unuan fojon sendita al Sétif en Alĝerio. Komence li entreprenas mallongedaŭrajn vojaĝojn. La Ĝenerala Gubernio en Alĝerio donas senpage koncesiojn kaj la ĝeneva komercfirmao klopodas ricevi terenon de 500'000 hektaroj, sed ricevas nur 20'000 en la ĉirkaŭaĵo de Sétif. Tiu urbo troviĝas en la provinco Konstantino. Kiel kompenso ĝi sin devigas starigi dek vilaĝojn kaj koloniadi ilin per – tio estas klara, plej prefere svisaj – elmigrantoj kiel koloniistoj.

Henry ricevas la taskon antaŭprepari ilian alvenon kaj superrigardi la ekipadon de la vilaĝoj. Je ĉi tiu okazo li ekkonas la virtembergan komerciston Henriko NICK kaj ligas sin kun li je prospero kaj antaŭ ĉio je ruiniĝo.

Fine de la jaro 1853 revenas Henry hejmen al Ĝenevo – ankoraŭ li estas engaĝita subtenanto de la kristanaj societoj. Efektiviĝas renkontiĝo inter li kaj Harriet Elizabeth BEECHER-STOWE, la aŭtorino de “*La Kabano de Onklo Tom*”.

Ŝia batalado kontraŭ sklaveco, ŝia fervoro kaj ŝiaj neŝanceleblaj pensmaniero kaj principoj ne maltrafas siajn efektojn ĉe Henry.

Kune kun sia patrino kaj Florence NIGHTINGALE – pri ŝi vi pli poste legos – estas Harriet BEECHER-STOWE unu el la tri virinoj, kiuj praktikas benriĉajn influojn al Henry.

## La varbulo

En la jaro 1854 Henry vojaĝas tra la kantono Vaŭdo. Tie li varbas koloniistojn nome de siaj komisiistoj. La ĝeneva komercfirmao decidas preferinde elekti ekloĝantojn, kiuj disponas pri monaj rimedoj por pli rapide atingi profiton.

Do, ne sufiĉe da aspirantoj posedas la dezirindan monon, antaŭ ĉio ne tiuj, kiuj jam vivas je la kostoj de la komunumoj kaj estus dezirinde, ke ili elmigru.

En la sama jaro Henry vojaĝas la duan fojon Afriken. Je tiu okazo formiĝas ĉe li la ideo starigi propran firmaon. Li entreprenas unuajn paŝojn por ricevi koncesiojn. Ĉi tio, ĉar li konstatas, ke la projekto de la ĝeneva komercfirmao ne plenumas la esperojn. Epidemioj, prokrastoj kun la konstruo de la vilaĝoj kaj dubindaj faraĵoj montriĝas al Henry, kaj li decidas distanciĝi de la firmao. Evidente ĝi nur volas gajni la plej grandan profiton el la privilegioj, kiujn ĝi ricevis de la ŝtato Alĝerio.

Ekzemple oni komencas per la konstruo de pluraj vilaĝoj por ricevi la traktatite fiksitajn premiojn de 800 hektaroj da tereno, poste ne ekloĝ-



igas tiujn vilaĝojn, kvankam tio estis certigita al la publika estraro.

Dum la plantejoj – kiuj estas prizorgataj helpe de malmultekostaj laborfortoj – ekprosperas, kreskas la malfacilaĵoj en la vilaĝoj de la koloniistoj. La loĝejoj estas malbonaj, la klimato ne sufiĉe favora kaj en pluraj regionoj eĉ sane malfavora. Akvumiloj kaj stratoj mankas aŭ ili estas nesufiĉe bone konstruitaj.

Baldaŭ rondiras la amareca kaj cinika frazo: *“La solaj kolonioj, kiuj kreskas, estas la tombejoj.”*

La tria vojaĝo okazas en la jaro 1855. Malgraŭ la malfacilaĵoj de la ĝeneva komercofirmao Henry estas konvinkita, ke en la afrika lando kuŝas egaj eblecoj. Sukcesa negoco, kaj aĉetita arbaro tuj revendita kun gajno plifortigas lin en tiu kredo. Li pretas enkalkuli riskojn kaj havas altajn progresigajn planojn. Li volas labori kontraŭ la dezerto, akvumi kaj prilabori la sekan terenon, do redoni al la tiama grenejego de la antikva romia imperio en Afriko ties tiaman riĉecon.

Henry estas konvinkita pri la humana misio de sia entrepreno. Kaj vere: *“li sonĝas pri senfine vastaj tritikokampoj prilaborataj de malbone salajrataj araboj. Ĝenevaj bankestroj uzu kaj disdonu la profiton kiel almozojn al la mizeruloj en la ĝeneva povra kvartalo “Saint-Gervais”.*

Henry kaj sia partnero Henriko NICK ne volas perdi tempon. Sed la “muelejoj de la burokratio” malrapidegas, monatoj senprogrese preterpasas.

En la espero plifortigi sian situacion per fondo de propra entrepreno kaj plibonigi siajn ŝancojn Henry ekestabligas 1858 la firmaon “Financo - kaj Industrio - societo de la Muelejoj de Mons-Djémila”. Kiel inspektanta komisio li trovas seriozajn personecojn, kiuj ĝuas senriproĉan reputacion en la komerca mondo.

Denove komenciĝas ĉasado al koncesioj. La alĝeria ŝtata gubernio malaprobas ĉiujn liajn planojn. En sia ega malespero Henry prenas la decidon sin turni rekte al la imperiestro.

## **Vidalvide de la milito**

### **Bona samariano en Solferino**

Do, Henry postvojaĝas la imperiestron Napoleono la III-a, kiu troviĝas pro militado kun sia armeo en Italio. La 21-an de junio 1859 Henry atingas la urbon Brescia, kie li esperas renkonti Napoleonon. Sed la imperiestro, post la plej lastaj bataloj, trafis Viktoron Emanuelon la II-an kaj jam estas survoje al Solferino. Tie ekokazos – laŭ la eldiroj de oficiroj – granda batalo.

Post mallonga ripoza paŭzo Henry veturas suden kun rekomendo de generalo Guillaume-Henri DUFOUR, adresita al marŝalo MAC-MAHON.

La 24-an de junio Henry atingas Castiglione en la proksimeco de Solferino. Ĝus finiĝas unu el la plej sangaj bataloj de post “Waterloo”. Post la kunfrontado inter 150'000 francoj kaj sardoj sub la gvido de Napoleono la III-a kaj 150'000 aŭstroj sub la imperiestro Francisko-Jozefo restas 40'000 mortintoj kaj



vunditoj (12'000 francoj, 6'000 italoj, 22'000 aŭstroj) sur la batalokampo.

Samarianaj ĉaroj enveturas Castiglione'n; estas trajno de teruro. Henry ŝtoniĝas dum momento pro tiu aspekto. Sur la batalokampo, kiu plenas de la ĝemegoj kaj de korduŝegaj dolorkrioj de vunditoj kaj mortontoj, la okazaĵo fariĝas absolute neeltenebla.

Matene la 25-an de junio Henry ordonas sian koĉeron al Brescia por aĉeti nutraĵojn kaj tion, kio plej necesas. Li restas ĝis la 30-a de junio 1859 sur la batalkampo kaj plenumas unuan helpon kaj donas konsolojn al la mortantoj. Ĉi tio, malgraŭ ke li scias, ke li povas fari tre malmulton, li ja estas nek kuracisto nek bona samariano.

Ĝus li donis mildigon kaj kvietigon al ege vundita hungara soldato. Tio perpleksigas aliajn helpantojn. Do, kiam la virinoj vidas, ke li flegas eĉ vunditojn el ĉiuj nacioj, ankaŭ ili sekvas lian ekzemplon kaj krias: *Tutti fratelli!* "Ĉiuj estas fratoj." Ekde nun ili helpas sen diferenco al amikoj kaj malamikoj.

Sen konscii pri tio, ili jam uzas principon, kiu estos la ĉefe vojdonata, pionira novaĵo de la venonta Ruĝa Kruco: la neŭtraleco de ĉiuj vunditoj.

Indignite pri la situacio, en kiu oni lasas la soldatojn al si mem, Henry skizas unuajn planojn. Por tio necesas:

- la senprokrasta transportado de la vunditoj al kampolazaretoj,
- kiel eble plej rapida kuracado,
- suface granda nombro da kuracistoj, kirurgoj kaj sanitaristoj,

- tuja fortransporto de la kadravoj,
- eviti epidemiojn.

- La plej grava estu: Doni protekton, kiu ebligu al la helpantoj plej grandan efikon por plenumi sian taskon.

Henry ne plu kuraĝas preparoli siajn komercaĵojn pri Alĝerio kun la imperiestro. Li decidas hejmenvojaĝi. Ree en Ĝenevo li dediĉas sin al la komercoj kaj unue publikigas "*Memorando pri la Societo de la Muelejoj de Mons-Djémila*". Li trankviligas la akcioposedantojn kaj veturas al Parizo. Tie li volas prezenti tiun dokumenton al Napoleono la III-a. Tiu iniciativo sukcesas. Komence de 1860 ĝi alportas koncesion por plia akvofalo kaj 234 hektaroj da tereno. La kunsocietanoj en Ĝenevo rekonfidas en tiuj aferoj.

Sed Henry ne povas forgesi la spertojn el Solferino. Li ekverkas la libron "*Un Souvenir de Solférino*."

### Ideo antaŭenmarŝas

"*Un Souvenir de Solférino*" aperas novembre 1862 en kvanto de 1'600 ekzempleroj. Henry mem portas la elspezojn. La libro ne disvendiĝas tra la librejoj. Li disdonas kaj sendas ĝin celate al ĉiuj multinflujaj homoj kaj potenculoj, kiuj troviĝas en Eŭropo: Princoj kaj princinoj, politikistoj, diplomatoj, ministroj, filantropoj kaj aŭtoroj. La reagoj estas venke grandiozaj.

Florence NIGHTINGALE ricevas la libron tra la ĝeneva pastoro GAUSSEN. Ŝi ne dubas je la celoj, kiujn H. DUNANT prilaboras. Sed ŝia opinio estas, ke la registaroj mem



zorgu pri flego de la vunditoj. Ŝi rememoras sian taskon dum la Krimeo-milito. Je ordono de la generala stabo ŝi reformis la sanitaristan servon de la angla armeo.

### **Naskiĝo de humana institucio**

Henry vojaĝas tra Eŭropo kaj varbas en domoj de princoj, dum hejme en Ĝenevo liaj kunuloj antaŭ-preparas “la Konferencon de la Espero”. Ĝi estas oficiale malfermita la 26-an de oktobro 1863 en la “*Salon des Palais d’Athénée*”. Tri-dekses personoj ĉeestas. Dekses ŝtatoj estas reprezentataj. Generalo Guillaume-Henri DUFOUR malfermas la asembleon kiel prezidanto de la Internacia Komitato. La delegitoj el Svislando, Francio, Nederlando, Italio, Britio, Svedio, Norvegio, Hispanio kaj Aŭstrio, el la germanaj ŝtatoj Hessen-Darmstadt, Hannover, Badeno, Virtembergo, Bavario kaj Saksio, Mecklenburg-Schwerin, eĉ Ruslando kaj Prusio, Danlando kaj Portugalio deklaras respekti la decidojn de la konferenco.

La Artikolo 8-a diras: *La helpistoj portas en ĉiuj landoj kiel ekkonigan signon blankan brakbendon kun ruĝa kruco.*

### **La Ĝeneva Konvencio**

Generalo DUFOUR malfermas la internacian konferencon je la 8-a de aŭgusto 1864 en la urbodomo de Ĝenevo. La 22-an de la sama monato la Ĝeneva Konvencio estas subskrib-

ita de dekdu el dek ses partoprenintaj ŝtatoj.

### **Bankroto**

Post la subskribo de la “Ĝeneva Konvencio” Henry turnas sin al siaj komercaĵoj. La “*Société générale de l’Algérie*”, entrepreno kondukata de “Sanktaj Simonistoj” endanĝerigas lian projekton. Liaj komercoj en Alĝerio pli kaj pli malboniĝas. Fine li bankrotas. La skandalo perfekt-iĝas. Al la juna viro el bona familio, la fondinto de la Societo de Junaj Kristanaj Viroj kaj de la Ruĝa Kruco, okazis fatala eraro: Li malsukcesis en komercado.

Henry skribas en la jaro 1867: “*Estis por mi katastrofo. Kaj ĉi tiu katastrofo erupciis en la plej bona vir-aĝo super mi; mi ne ankoraŭ estis 40-jaraĝa. Ĉio mallumis kaj miaj fortoj forlasis min kaj mi falis en tristan ĉagrenon.*”

### **Lernejo de soleco**

Henry forlasas por ĉiam sian naskiĝ-urbon Ĝenevo en la jaro 1867 kaj vivas dum kelkaj jaroj en Parizo. Okaze de la pariza Monda Ekspozicio li estas honorata pro siaj meritoj per ora medalo. Li vivas en povraj cirkonstancoj kaj gajnas sian vivtenon pere de ĵurnalista laboro.

1870, post la eksplodo de la german-franca milito, li fondas Ĝeneralan Zorgo-societon kaj dum la sieĝo de Parizo helpsocieton.

1874-86, ofte malsana, Henry kondukas tristan, malzorgitan vivon en soleco kaj en materia mizero. Liaj loĝlokoj sinsekve estas: Stuttgart,



Venecio, Romo, Korfu, Alsaco, Stuttgart, Bazelo, Berno, Londono, Heiden, Seewis, Engadino, Karlsruhe, Parizo, Stuttgart kaj Londono. De tie li sendas helpokrion al sia familio en Ĝenevo.

Ekde 1887 li ricevas de sia familio jaran rentumon de 1'200 frankoj kaj ekloĝas definitive en Heiden. Tie li organizas en la jaro 1888 sekcion de la Ruĝa Kruco.

Henry kolektas dokumentojn pri la historio de la Ruĝa Kruco kaj komencas manuskripti siajn memoraĵojn. Li ŝanĝas la loĝejon kaj vivas ekde 1894 en la regiona malsanulejo de Heiden, kie li estas prizorgata de la kuracisto ALTHERR.

La 10-an de decembro 1901 li estas honorata kune kun la franco Frédéric PASSY per la unua Nobel-pacpremio. En 1903 li fariĝas honora doktoro de medicino.

Honoroj el la vasta mondo atingas lin okaze de lia 80-a naskiĝtago en 1908. Eĉ alvenis telegramo de la Svisa Federacia Registaro.

Sekvontjare, do en 1909, li skizas testamenton.

Henry DUNANT mortas la 30-an de oktobro 1910 en Heiden. La entombiĝo okazas la 2-an de novembro en la tombejo «Sihlfeld» en Zuriko.

### **Konkludaj vortoj**

Ĉu Henry DUNANT 1828 – 1910 vere estis samtempulo de Ludoviko Lazaro ZAMENHOF, kiu vivis de 1859 – 1917?

La urbon, en kiu kreiĝis 1908 Universala Esperanto Asocio, Henry DUNANT jam forlasis por ĉiam en la jaro 1867.

Por mia prelegeto mi pritraktis la libron “Henry DUNANT Finanzmann – Phantast, Gründer des Roten Kreuzes, eine Bildbiographie” de Marc DESCOMBES. Pri nia komuna, zamenhofa lingvo mi nur – aŭ eble pli bone – tamen trovis ion en ĉi tiu libro, kio interesas nin:

“*Un souvenir de Solferino*” estas tradukita en diversajn lingvojn; germanen, anglan, nederlandan, danan, svedan, norvegan, italan, hispanan, portugalan, grekan, rusan, turkan, persan, korean, japanan, indonezan, dari (Afganio) kaj esperanten sub la titolo **Rememoro pri Solferino**, Parizo 1906 (paĝo 158).

Noto: Tiu libro konsulteblas en CDELI.

-oOo-

## **Wil**

### **Esperanto-Klubo Wil**

[www.esperanto.ch/wil](http://www.esperanto.ch/wil)

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder, Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel. : 071 393 41 49. [chaves-walder@bluewin.ch](mailto:chaves-walder@bluewin.ch) kaj Wolfram Fischerm Steigstrasse 12, 9116 Wolfertswil. Tel. : (P) 071.390.04.48 (O) 071.390.04.44. Fax : 071.390.04.47.

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19.00 en la Restoracio Schweizerhof, Bahnhofstrasse 18 (piedire je kvin minutoj oriente de la stacidomo).

-oOo-



# Zürich


## Esperanto-Societo Zürich

(Adreso: Akazienstrasse 6, Poŝtfako 858,  
CH-8034 Zuriko)

Informojn pri la aktuala programo de  
Esperanto-Societo Zuriko vi trovos en la  
reto sub:

[www.esperanto.ch/zuriko/programo.ht](http://www.esperanto.ch/zuriko/programo.ht)

-oOo-



# Kongresen

## KELI-Kongreso 2008 en Slovakio

André Sandoz

### Hotelo nomata ESPERANTO

La kvinetaĝa konstruaĵo staras sola sur herbejo ĉe la piedo de la montaro Altaj Tatroj. De la provinca strato mi jam povas legi sur la front-muro :

#### HOTEL ESPERANTO

Ĉu esperanta kunvenejo ferienda aŭ kultura? Tute ne! Neniu - de la direktoro ĝis ĉambristino - parolas eĉ unu solan vorton de nia lingvo. Klarigo troviĝas dekstre de la enirpordo. Jen du latunaj paneloj, unu slovake skribita, la alia esperante :

EN TIU ĈI HOTELO ESTIS DUM LA TAGOJ 9A ĜIS LA 11A DE MAJO 1969 FONDA KONGRESO DE ASOCIO DE ESPERANTISTOJ EN SSR.  
HONORE AL TOLSTOJANO,  
BATALANTO POR LA PACO,  
KUNAŬTORO DE LA UNUA LERNOLIBRO DE ESPERANTO POR SLOVAKOJ, MUDR ALBERT ŠKARVAN, KONGRESO KONFIRMIS LA TITOLON DE LA HOTELO  
**ESPERANTO**

Tie ĉi okazos de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto 2008 kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI).



Kune kun kvindeko da partoprenantoj el 12 ŝtatoj mi ĝuis belan semajnon en amika etoso. Bona raporto pri tiu kongreso jam aperis en la revuo *Dia Regno*. Mi do simple elvokos kelkajn proprajn impresojn el la du proponitaj busaj ekskursoj. Tri ĉefaj bildoj restas profunde en mia memoro :

Unua bildo : La ĝishorizonta pejzaĝo arbara eldetruita antaŭ multaj jaroj de uragano simila al nia Lotaro. Fine de julio la tuta areo estis senlime rozkolora maro de epilobioj spontane kreskintaj tie, kie nova juna arbaro baldaŭ renaskiĝos.

Dua bildo, fakte bildaro en Groto Jaskyňa Slobody : Dum tuta horo ni marŝis, supreniris kaj malsupreniris laŭ koridoroj kaj ŝtuparoj inter nekredeble belaj stalaktitoj, stalagmitoj kaj ĉiuj imageblaj ŝtonaj kunkreskaĵoj, 1600 metrojn longa estis tiu fabela irado.

Tria bildo : Grandega ligna preĝejo evangelia de la 18a jarcento. Star-

anta origine en vilaĝo dronigita pro konstruo de val-baraĵo, ĝi estis en 1982 malmuntita kaj remuntita en loko, kie ĝi nun daŭre utilas. Ĝi povis kaj ankoraŭ povus enteni 6'000 homojn. Kiel samaj tiutempaj neoficialaj preĝejoj, ĝi laŭleĝe devis esti konstruita dum unu jaro sen eĉ unu sola najlo kaj sen sonorilturo. Enirinte, mi staris, mi sidiĝis. Mi imagis min ĉirkaŭata de miloj da gefratoj, kunpremita en komuna kantado de psalmoj. Nura revo ! Mi eliris el la altega ligna kupolo dum la pordistino kojnigita inter du benkoj daŭre inventaris siajn vendotajn poŝtkartojn. Nia buso atendis nin.

Mi vidis Slovakion. Mi ne vidis urson. Kiam ni demandis la ŝoforon, ĉu ni vidos ursojn, li respondis : « *Ne, certe ne. Sed bonvolu ne promeni dumnokte ĉirkaŭ via hotelo. Kelkfoje venas ursino por esplori la rubaĵojn.* »

-oOo-

## **Dek-du tagoj survoje al Roterdamo per biciklo**

### **Luc Allemand**

Jam de kelka tempo mi imagis fari tian biciklan vojaĝon, sed se tiu aventuro ĵus okazis, tio estas verŝajne dank'al vespera renkonto esperanta komence de la jaro 2008, eble en februaro, en kebabejo en Neuchâtel. Tie mi babilis kun Mireille Grosjean, Cesco kaj du aliaj studentoj eklernantaj esperanton. Mi ne plu memoras ekzakte, kial ni interalie parolis pri la internaciaj ekzamenoj kaj pri la venonta

Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Roterdamo. Dume en mia kapo okazis pripensoj kaj mi demandis : « *Kiel fore estas Roterdamo per biciklo, ĉu mi havos sufiĉe da tempo inter la komenco de miaj ferioj kaj tiu de la kongreso ?* »

Respondoj ŝajnis ebla mian nunfaritan planon.

Poste, en la aŭtomobilo, Mireille – kiu havas sufiĉe gravan rolon por decidi tiajn aĵojn – diris al mi : « *Se*



vi biciklos ĝis Roterdamo akurante por la kongresa solena malfermo, vi havos la honoron saluti la kongres-

anojn nome de Svislando. » Jen plia motivo.



Komenco de la granda aventuro.

### 5-an de julio: Finfina ekforiro

Post pluraj monatoj de pretiĝado, tio estas: kontakti esperantistajn gastigantojn de *Pasporta Servo*, printi mapojn el la reto, enordigi mian biciklon kaj konstrui ties mapo-portilon – tiel mi povos pli facile konsulti miajn mapojn, ol se ili estus en mia dorso-sako – alvenas finfine la tiom atendita tago; tiu de mia foriro, la sabaton 5-an de julio.

Kun siaj biciklo-sakoj la malantaŭo de mia biciklo fariĝis vere peza, kvankam libre mi decidis kunporti nur la *Pasporta-servon* kaj iun Novan Testamenton kun Psalmoj. Sed tio ne malhelpos bone veturi.

Hodiaŭ mi faros nur etan etapon, ian antaŭan etapeton. Fakte mi

decidis iri unue nur ĝis *Les Aidges*, proksime de *Les Bois*, vilaĝo je unu horo per biciklo fore de La Chaux-de-Fonds.



Foriro

Tie mi havas amikojn, kiuj ĉiam bonege akceptas min, kaj tiel mi povos finpretiĝi trankvile. Mi forlasas mian hejmon kaj miajn gepatrojn je la 4-a horo posttagmeze.



La vera unua etapo estos por morgaŭ.

Mi aŭdis ke ekzistas iu vojo pli taŭga, ol tiuj, kiujn mi jam konas, por malgrimpi en la gorĝojn de *La Ronde* per biciklo. Tio estus pli rapida vojo, ol se mi ĉirkaŭus tra la kantona vojo, ĉar mi scias, ke el tiu arbarfunda loko, kie fluas la rivero *La Ronde*, oni povas rekte grimpi al *Les Aidges*, kaj poste iom pli fore al *Les Bois*. Mi do tuj iras ĝustdirekten, sed male al la vojo, kiun aŭtomobilo uzas.


Haltante iom pli fore mi salutas najbarinon, kiu laboras en sia ĝardeno. Ni diskutas momenteton. Fiere mi rakontas pri mia projekto. Kiam mi ekruligas la radojn, ia bruo indikas, ke la bitumo komencas gluiĝi al la pneŭmatiko. « *Oni ne volas lasi vin foriri!* » ŝerce diras Prisca. Suno varmas.

Funde de “mia kamparo” mi alvenas al la priaŭdita arbara vojeto. Fakte, kvankam oni diris al mi, ke ĝi estas pli veturebla ol la aliaj, almenaŭ por biciklo ĝi aperas al mi tre kaosa, ĉefe pro mia neordinare peza veturilo. Mi eĉ iom timas por la “sinteno” de mia bagaĝo, kaj do kelkfoje helpas suprenigante je kelkaj centimetroj la pezaĵon, piedirante apude.

Verŝajne mi neniam antaŭe vivis tiom lacigan malgrimpon. Sed kompreneble la regrimpado aliflanke de la valetoj ankaŭ ŝvitigas.

Kiam mi iras al tiu soleca domo ĉe miaj amikoj, mi ĉiam esperas, ke mi trovos ilin hejme. Alvenante mi sonorigas ĉe la pordo. Mi atendas. Neniu respondas kaj tamen aŭdeblas

paŝoj, voĉoj, verŝajne el la supra etaĝo. Mi eniras kaj vidas plurajn ŝuojn: ili havas gastojn. Mi do komprenas, kio okazas: Ili aŭdis min, sed ne respondas, ĉar ili estas farantaj “familiajn konstelaciojn”. Mi ne klarigos, kio estas tio, mi nur diras, ke tio fariĝas grupe kaj principe ne estas haltigebla. Kaj en *Les Aidges* ili organizas tion po unu fojon monate.



La soleca domo *Les Aidges*

Sed tio ne gravas. Mi instalas mian biciklon en la garbejon kaj atendas trankvile.

Post nelonga momento plafona pordo malfermiĝas, personoj malgrimpas. Kiel ĉiam la infanoj Samuel kaj Aurélie ĝojas vidi min, kaj reciproke. Dum la vespero ni triope iros al apuda kampo por vidi ĉevalojn. Aurélie tre ŝatas la ĉevalojn. Poste mi ankaŭ montras mian planon sur mapo. Fabienne ŝajnas interesata kaj iel miras, ke mi imagis tiom grandan vojaĝon tra la “mondo”, tio estas pli fore ol en la komprenebla ĉirkaŭa pejzaĝa lando.

### **Dimanĉon 6-an de julio : 1-a tago**

Matene Fabienne donas al mi duonan ŝaf-fromaĝon, ĉu por ĝin



donaci al venonta gastiganto, ĉu por nutri min dumtage.

Ekstere pluvegas. Kun helpo mi ligas kontraŭpluve rubaĵ-sakojn sur miajn biciklo-sakojn. Fabienne,



En *Les Aidges* Samuel kaj Aurélie kun siaj ĉevaloj

Kvankam mi forlasis mian hejmon hieraŭ, mi decidis nombri miajn vojaĝajn tagojn ekde hodiaŭ, eble ĉar nun reale komenciĝas la aventuro en nekonatejon. Ekde hodiaŭ mi bezonos mapon. Je la 10-a horo mi transiras la vilaĝon *Les Bois*, kaj komencas trairi Ĵurason, belan montetaron de mia lando, sed hodiaŭ sub pluvo !

Kiam konvenas tempo por tagmanĝi, tiam mi haltas en malplena stratborda stalo en la loko nomata *La Caquerelle*. Miaj ŝuoj tiom malsekas, kvazaŭ oni estus metinta ilin en lagon. Mi do anstantaŭas ilin per miaj sandaloj, sen ŝtrumpetoj kompreneble. Ne gravas, se malsekiĝos miaj piedoj, sed kian eraron mi faris uzante fermitajn ŝuojn sub tiu hodiaŭa pluvego ! Tiuj ŝuoj restos sur mia bagaĝoportilo ĝis ili

Aurélie kaj Samuel amike min akompanas supren sur la ŝtona vojo ĝis pli firma strato proksima al domoj. Tie ni nin adiaŭas.

sekos, kaj tiam mi vidos, ĉu ili ankoraŭ uzeblis.

Sed nun, forlasante tiujn zorgojn mi sidiĝas sur fojnan amaseton kaj en tiu sekejo mi ĝuas miajn panjfaritajn sandviĉojn.

En apuda kafejo mi poste elspezas miajn kelkajn kunprenitajn frankojn, kiujn mi ne plu bezonos poste, revarmigante min per teo. Mi iom studas mian mapon kaj demandas al la kafejestrino : « *Kiel plej facile atingi Lucelle per biciklo, kiam malsekas ?* » Ĉar fakte tiu vojero ne estas tre preciza sur mia mapo, mi imagis uzi ĉi-tie arbarajn vojetojn, sed kun tiu vetero mi iom dubas, ĉu tio estas bona ideo, ĉefe pro mia hieraŭa travivaĵo !

Ŝi tuj venas rigardi mian mapon kaj pripensas, ideumas, ekpridiskutas kun la trinkantaj gastoj. Ŝi finfine demandas sian filinon, ĉu ŝi pli bone



konas la regionon, kaj tiu-ĉi venas kaj pripensas, kaj finfine demandas ankoraŭ iun alian. Ŝi akompanas min eksteren kaj ĉe la pordo ni dum momento babilas, ŝi montras al mi la dirite bonan vojon.

Pluvo nun ĉesis, mi ekbiciklas tra la indikita vojo, transiras aŭtoŝoseon, arbaron, malgrimpas ĉefvojon, kaj atingas la landlimon. Ĝis nun mi ĉiam havis malfavoran antaŭjuĝon kontraŭ la doganistoj, ĉar mi ne ŝatas kontrolojn. Sed tamen ĉifoje mi decidas alparoli ilin sen antaŭjuĝo, nur kiel al iu ajn, por demandi kiun vojon mi prefere sekvu. Ili tre afable respondas kaj interesiĝas pri mia vojaĝo sen kontroli miajn kunportaĵojn nek mian legitimilon.

### Tra Ĵuraso

Mi preteriras rivereton nomata *La Lucelle*, same kiel la samnoman vilaĝon, supreniras valflankon, kaj baldaŭ alvenas en la proksimeco de Bazelo.

Pere de mia el *google-map* printita mapo mi facile trovas en *Village-Neuf* (kvartalo de *Saint-Louis*) la domon de S-ro Bertrand Wick, mia unua *Pasporta-servo*-gastiganto. Mi sonorigas : neniuj ! Mi diris, ke plej frue mi alvenos je la 17-a, nun mia brakhorloĝo indikas la 17h10. Mi ŝirmiĝas kontraŭ reekpluveto sub la perono, kaj post kelkaj minutoj mi vidas viron alveni. Li diras : «*Francoj ĉiam malakuratas !*»

Tute ne gravas. Mi elligas miajn biciklosakojn, sekigas miajn vestaĵojn en ĉambro, duŝas min. Bertrand kuiras bonajn salajn kaj

sukerajn alzacajn specialaĵojn nomatajn "sèche". Alvenas lia amikino, kaj kune ni havas plezuron.

Post la manĝo mi klarigas, ke kiam mi pretigis mian vojaĝon, tiam mi ne trovis gastigantojn por la du sinkvadjaj etapoj en Germanio. Estos inter Strasburgo kaj Bad-Neuen-Ahrweiler. Por tiu distanco mi verŝajne bezonos tri tagojn, do du noktojn. Tamen mi ekiris senzorge opiniante, ke mi iel elmerdiĝos trovante dormejon ĝustatempe.

Tiam Bertrand pripensas kaj diras, ke ŝajnas al li, ke devas esti iu gastiganto ie, kie mi bezonos, kaj li rigardas en la *Pasporta-Servo*. Verŝajne mi ne tute bone serĉis dum mia



pretigado, ĉar li trovas la celitajn adresojn.

Laŭ lia propono per lia komputilo ni sendas retmesaĝojn al tiuj eblaj gastigantoj, esperante, ke ne estas tro malfrue. Nekredeble : Jam iu respondis al nia retmesaĝo dum la nokto !

(Daŭrigo venonnumere)



# La svisa koruso kantis dum la internacia vespero de la Universala Kongreso

Elisabeth de Mestral



Fotis Derk Ederveen.

Post intensa laboro dum la unua parto de la jaro fare de la kantantoj de la Svisa Koruso, ĉiuj retroviĝis en Roterdamo.

Emocio, korbatoj, timetoj, eĉ defio, plezuro tiklis ĉiujn, ĉar per nia tradicia muziko ni konsciis iel prezenti bildon de nia lando.

Dum la UK-semajno ni ofte kuradis por trovi kantsalonon, por kunigi ĉiujn sammomente, poluri kelkajn detalojn... kaj finfine alvenis la tago !

Sub la lumegoj de la scenejo niaj fortoj, niaj energioj kuniĝis : **La Katerino de Finhaut de G. Haenni kaj la Vinberisto de C. Boller** aŭdiĝis kvarvoĉe en la granda koncert-

salono. Laŭ la aplaŭdoj kaj taksadoj ŝajnas, ke la publiko travivis tre agrablan momenton.

Ĉiuj el ni rememoros tiun nekutiman kaj belan okazaĵon. Aldone ni ankaŭ aŭskultis la nederlandan koruson Malva, francan koruson, japanan voĉaron kaj la jam tre konatan voĉaron Akordo de Nederlando.

Nun kelkaj novaj membroj aliĝis al nia koruso. Flanke de nia svisa repertuaro ni komencas labori aliajn kantojn de la mondo, ekzemple el Finnlando. Kiel nuna celo ni intencas registri kelkajn kantojn por elŝuti ilin sur blogon.

Elisabeth de Mestral



## Ĉu vi ŝatus kunkanti ?

Renkontoj okazas proksimume po unu fojon monate en Etoy, ĉefe dimanĉe kun kuna pikniko.

Informoj ĉe Elisabeth de Mestral, la direktorino :

Le Prieuré 8, 1163 Etoy. Tel. : 021.808.76.43.

Retadreso : de.demestral@bluewin.ch

## Jen la tekstoj de la kantoj interpretitaj en Roterdamo Ilin esperantigis Dominique de Mestral

### La Katerino de Finhaut

Al paradiz' fidela edzino,  
Purgatorien ĉiuj edzoj ;  
Ino koketa ĉe la diablon !

La Katerino de « Finhaut »,  
Ŝi portis ŝuojn elegantajn,  
Ja iom tro ŝatis la dancon,  
Manĝadis rancan lardon kaj panon  
Por aĉeti belajn vestojn.

Iun vesperon karnavalan  
Satan' maskita venis balen,  
Donis ŝin kisojn kaj karesojn.  
La fiulino sen bedaŭroj  
Turnis la dorson, turnis la dorson,  
Al amiko sia turnis la dorson.

Ho Katerino ! Ho Katerino !  
Ho Katerino vi foriras,  
La trompan ĉarmon vi ne timas ?  
« Li pli belas ol vi, mia Petro ! »  
Ŝi sekvas Satan' arbarhelejen  
Kaj neniam, kaj neniam ŝi revenis.

### La vinberisto

*Rekantaĵo :*  
*La vinberist' vitejen alsupras,*  
*Kie vi vinberisto ?*

*La vinberist' vitejen alsupras,*  
*De la lagobord' al la alta ĉiel'.*

Jen ja aperas la ĉapelo,  
Sed ja ne ĉapelo dimanĉa,  
Ĝi eĉ similas korvon ja  
Kiu staras sur branĉeto.

Kie vi, vinberist', kie vi, vinberisto ?  
*(Rekantaĵo)*

Kaj nun du brakoj ja aperas,  
Sed certe ne brakoj knabinaj,  
Nek ja de advokato nu  
Kiu trinkas kamomilon.

Kie vi, vinberist', kie vi, vinberisto ?  
*(Rekantaĵo)*

Fine aperas dikaj ŝuoj,  
Sed certe ne ŝuoj por danci,  
Oni ja faris ilin por  
Alsupri ĝis ĉielo.

Jen ja vi, vinberist', jen ja vi,  
vinberisto.

*Rekantaĵo:*  
*La vinberist' vitejen alsupras,*  
*Jen ja vi, vinberisto,*  
*La vinberist' vitejen alsupras,*  
*De la lagobord' al la alta ĉiel'*  
*Jen ja vi, jen ja vi, vinberisto !*




## Tre sukcesaj konferencaj tagoj de André Cherpillod

La sabata aranĝo en esperanto pri Ido ĉe CDELI kaj la dimanĉa en la franca en La Vue-des-Alpes pri La Biblio grupigis entute 30 partoprenantojn, inter kiuj duono ĉeestis ambaŭ kunvenojn.



Dum la prelegoj atente aŭskultis la publiko kaj dum la paŭzaj momentoj ĝi vigle interŝanĝis siajn vidpunktojn kaj aĉeteme frekventis la libroservon. Sume vendiĝis verkoj de André Cherpillod por pli ol mil frankoj.



Claude Gacond kaj André Cherpillod diskutas kaj Mario Bélisle elektas librojn.

### Maurice Favre

12 majo 1922 – 9 aŭgusto 2008

En la gazeto *L'Impartial* anonciĝis la morto de Maurice Favre per la enkonduka frazo: *La esperantisto Maurice Favre foriris kiel libera homo.* Tio atestas, ke la famiĝinta advokato, prezidinto de la radikala partio kaj de la tribunalo, ne kaŝis sian apogon al esperanto kaj al ties humanismaj valoroj, kiujn li ŝatis diskonigi kaj defendi. La lingvon li eklernis, instruata de Olivier Tzaut, kiam li helpis, kiel notario, al la fondo de Gastejo Edmond Privat, institucio de li ĉiam malavare kaj vigle subtenata, kiel ankaŭ la Kooperativo de Literatura Foiro dum multaj jaroj. Same li amikis al CDELI, atentigante la politikistojn kaj aŭtoritatulojn pri ĝia kultura graveco por la urbo La Chaux-de-Fonds. Dankon, kara samideano !



*Redaktas : Richard Schneller (rs), Höhenstrasse 1 b, CH-9300 Wittenbach, rischneller(ĉe)gmail.com. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.*

## **Du novaj Mondaj Heredaĵoj de Unesko en la svisaj Alpoj**

*Tre malofta geologia fenomeno kaj eksterordinara fervojlinio, ambaŭ en la svisaj Alpoj, estis akceptitaj la 7an de julio 2008 en la listo de la Monda Heredaĵo de Unesko. (rs)*

### **Svisa tektonika areno Sardona**

La formiĝo de la Alpoj estis komplika fenomeno. Ĝi okazis kiam en la kretaceo kaj terciaro la afrika kontinento puŝis la ebenajn stratumojn, kiuj malmergiĝis el la maro kaj faldiĝis ĝis plurmilmetra alteco. Okazis ankaŭ surŝovadoj de tavoloj ĝis 100 km longaj. Por nefakulo la ekzempleco de la tektonika areno Sardona ne estas evidenta, dum ĝi ekscitas la scivolemon de geologoj jam de pli ol 200 jaroj. Normale pli junaj stratumoj troviĝas super pli malnovaj, tamen ĉi tie estas la inverso. Verrucano-petroj 250 jarmilionojn aĝaj kuŝas sur multe pli junaj Flysch-petroj nur 35 jarmilionojn aĝaj. Inter ambaŭ troviĝas mallarĝa kalkŝtona bendo, la Lochsite-kalko. La estiĝo de ĉi tiu geologia ekcepto estas problemo pri kiu pasie diskutis la geologoj en la dua duono de la 19a jarcento.

La tektonika areno Sardona troviĝas sur teritorio de la tri kantonoj Glaruso, St.Gallen kaj Grizono. La

geologiaj elementoj kaj ecoj povas esti apreciatas de ĉiu vizitanto, do konsistigas la pedagogian kaj sciencon valoron de ĉi tiu regiono. La procezo de la montara formiĝo kun multnombraj petraj aperlokoj kaj la vaste videbla surŝovo estas impresive perceptebla kaj signifa por la scienca esplorado ek de la 18a jarcento. La mekanismo de la surŝovado estas parte ankoraŭ hodiaŭ enigmo por la scienco.


La demando estas: «Kiamaniere eblas ke proksimume 3 km dika, 50 km longa kaj 100 km larĝa petra tavolo, la tiel nomata Helveta kovraĵo, estis ŝovita je distanco de 35 km norden sen diseriĝo?» Sur argilo tio pli facile eblus, sed la ŝovado okazis sur kalko, malpli glita materio. Fakte la faldiĝo de la kalka stratumo estas la sekvo de altaj premoj kaj temperaturoj. Laŭ la strukturoj de la stratumoj la sciencistoj supozas ke la surŝovo okazis en la interno de la tero je profundeco de



proksimume 16 km en la tempo de antaŭ –35 ĝis –20 jarmilionoj kun la helika rapideco de kelkaj milimetroj jare. Favoris ĉi tiun procezon akvaj likvaĵoj el la petroj Verrucano kaj Flysch. Tiel la frotada rezisto malpliĝis kaj la kapablo gliti grandiĝis. Tiaj spuroj de tektonikaj surŝovoĵoj estas observeblaj nur en tre malmultaj lokoj en la mondo.

### Historio de la surŝova teorio

La natursciencisto kaj politikisto Hans Conrad Escher rekonis jam en la jaro 1807 ke en la loko nomata Lochsite (Sool, Glarus) kuŝas maljunaj petroj sur pli junaj. Lia filo Arnold Escher, la unua profesoro pri geologio en Zuriko, supozis en 1845 ke temas pri «kolosa surŝovoĵo», sed li ne publikigis sian teorion ĉar «neniu homo kredus tion, oni taksus min frenezulon». Anstataŭe li kreis abstruzan teorion de duobla faldiĝo. Lia disĉiplo Albert Heim transprenis ĉi tiun teorion kaj faris dogmon el ĝi, kiu estis akceptita pro la prestiĝo de tiu profesoro ĝis komence de la 20a jarcento, kiam la geologo August Rothpelz de la Munkena universitato pridubis la teorion de Heim kaj konkludis, ke temas pri grandega surŝovoĵo de stratomoj. Ĝis tiam oni ankaŭ ĝenerale kredis ke petrofaldiĝoj kaj montaroj estiĝis, ĉar la tero estus



Akvarelo de Hans Conrad Escher von der Linth pri la Sardona-tektoniko videbla ĉe Martinsloch proksime de Vättis. Maljunaj stratomoj kuŝas sur pli junaj. (El Vikipedio)

ŝrumpinta dum ĝia malvarmiĝo simile al malnova ŝrumpita pomo. Nur la teorio pri la ŝovado de la kontinentoj en 1912 ebligis klarigi la superŝovadon. La germana esploristo Alfred Wegener havis la ideon ke ĉiuj kontinentoj estiĝis pro la disdrivado de supozata prakontinento. En la 1960aj jaroj oni pli detalis ĝin kaj ĝi konatiĝis sub la nomo de la teorio de la plattektoniko. La moderna plattektonismo klarigas la estiĝon de la Alpoj pro kolizio de la afrika kun la eŭropa kontinentoj. En la kontaktozono stratomoj kunpresigis kaj estiĝis faldiĝoj kaj surŝovoĵoj.


(Resumo de: Martin Leuch, *Der Bau der Alpen*, *St.Galler Tagblatt*, 2008-08-09, p. 19.)

## Retia fervoja linio Thusis-Tirano

Fervojlinioj en la Unesko-listo estas malmultnombraj: post la Semmering-fervojo en Aŭstrio kaj la Darjeeling-Himalajo-fervojo en Barato, la Albula- kaj Bernina-Linioj

de la Retia Fervojo estas pionira verko de la fervoja arkitekturo konstruita antaŭ cent jaroj. Pro ekonomiaj kaŭzoj oni elektis mallarĝan intertrakan distancon de 1,00 m.






*La Bernina-Ekspresso sur la kurba ponto de Filisur eniras tunelon. (Fotis Cl. Gacond)*

Kio karakterizas ĉi tiun 122 km longan linion inter Thusis kaj Tirano? Fakte la fervojlinioj tra Albula kaj Bernina estas majstroverkoj, kiuj estiĝis per multflanka kunagado de politiko, ekonomio, tekniko, kulturo kaj naturo. Kun spektakle impresaj arkitekturaĵoj kiel viaduktoj kaj cirklaĵoj tuneloj la fervojo estas harmonie integrita en la bela montara pejzaĝo. Necesis 99 pontoj kaj 55 tuneloj por alsupri kaj descendi la pasejojn de Albula kaj Bernina. Ĉe la plej kruta loko, sude de la Bernina-pasejo, deklivo de 70 promiloj estas venkita.



*Sur la traceo antaŭe en la foto la trajno direktiĝas sub la ponto en cirklaĵoj tunelon de la monto en la fundo kaj revenos sur la ponto. (Fotis Claude Gacond)*

La veturado de Thusis ĝis Tirano daŭras proksimume kvar horojn por la 122 km. Tial oni nomis ŝerce la Bernina-Ekspreson «la plej malrapidan ekspreson de la mondo». Tio ne ĝenas la vojaĝantojn, kontraŭe, ili admiras la pontojn, tunelojn kaj pejzaĝojn traveturante diversklimatajn kaj diverslingvajn regionojn (germanan, romanĉan, italan), de la glaciakvo de la Lago Bianco ĝis la vitejoj kaj kaŝtanoj de la itala urbo Tirano.



*Ekzemplo de cirklaĵoj tuneloj inter Bergün kaj Preda por majstri deklivon (altecon de 416 m sur 6 km) sur la fervojlinio Albula-Bernina de la Retia Fervojo. [1]*

Sed kompreneble ĉi tiu linio – certe tre interesa por turistoj kaj ŝatantoj de fervojoj – aliflanke estas nemalhavebla por la enloĝantaro kaj vartransportoj. Ĝi estas retparto de la Retia Fervojo, ekonomie grava faktoro por la kantono Grizono, ankaŭ nomata kantono de la 150 valoj, kun la ĉefurbo Chur/Cuera/Coira.





*La konstruo de la Retia fervojo, la homoj kaj la konstruaĵoj [1]*

## **Kelkaj vidindaĵoj sur la linio Albula-Bernina**

– Inter Thusis kaj Tiefenkaŝtel troviĝas la ponto de Solis kun alteco de 90 m.

– La kurbita ponto post tunelo sur la rivero Landwasser proksime de Filisur.

– La cirklaĵaj tuneloj inter Bergün kaj Preda majstras altecon de 416 m sur 6 km.

– La Albula-tunelo je 1823 m sur maro estas la plej alte lokita en la Alpoj.

– La Bernina-fervojo estas la plej alte lokita dentradfervojo de Eŭropo. Ĝi venkas inter Tirano kaj Alp Grüm 1800 m de alteco.

– La cirkla ponto de Brusio.

[1] Hans Hofmann, Rhätische Bahn. Der Bahnbau. Die Männer der Bauzeit und ihre Werke 1886-1914. Calanda Verlag, Chur 1989.

## **Planlingvoj, Esperanto kaj la filmo**

- *Andreas Künzli*

*La produktado de filmoj en Esperanto estas tre modesta kompare kun la monda filmproduktado.*

Oni diras, ke pluraj famaj filmproduktistoj kiel Laemmle kaj Ĉaplino rekonis kaj agnoskis la valoron de Esperanto por la parola filmo antaŭ ĉio pro la klareco de tiu lingvo. Tamen ekzistis kompare nur malmultaj provoj enkonduki Esperanton kiel lingvon en la filmon. Tiel Esperanto

kaj aliaj planlingvoj bedaŭrinde ne sukcesis establiĝi en kinematografio sur pli alta nivelo.

En la jaro 1929 Paramount produktis tute mallongan filmon en Esperanto, kiu estis prezentita dum la nordamerika Esperanto-kongreso. Unu jaron poste povis esti montrita de la sama firmao en la 22a Universala Kongreso de Esperanto en Oksfordo alia filmo en Esperanto. En 1933, lige kun la internacia skolta ĵamboreo en Hungario, estis produktita sonfilmo, kiu entenis ankaŭ scenon en Esperanto.



La unua kompleta sonfilmo en Esperanto estis «Morgaŭ ni Komencos la Vivon». Temis pri germana originalo, al kiu oni aldonis la esperantan parolversion. Kiel respondeculo por tiu produktaĵo funkciis Jan Fethke (1903-1980), kiu sub la pseŭdonimo Jean Forge kiel germanpola filmreĝisoro bele kontribuis al la Esperanto-kulturo. Lia verko estis prezentita en la 26a Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo en 1934.

En la filmo «La Granda Diktatoro» (unua prezento de la originalo en 1940 en Novjorko), en kiu Charles Chaplin (Ĉaplino) paroladas kiel Hynkel en imagita lingvo, aperas en la juda geto surskriboj kiel lipharoj, razejo (por frizisto), kafejo

(trinkejo/restoracio), vestaĵoj malnovaj (vendejo de vestaĵoj aŭ brokantaĵo), cigaroj (kiosko), ĉambroj (hotelo), terpumoj (anstataŭ terpomoj), nutraĵoj. Esperantistaj lingvo-puristoj kritikis tiujn ĉi formojn kiel kripligon de Esperanto. La parolado de la frizisto kiel Hynkel fine de la filmo tute ne malsimilas al la pensado de L. L. Zamenhof, kreinto de Esperanto.

Post la Dua Mondmilito estis produktita aro da aliaj filmoj en Esperanto. Liston de tiaj filmoj oni trovas en interreto (Vikipedio) sub la titolo Esperanto-filmo.

Plej aktuale estas menciinda la filmigo de la krimromano Gerda malaperis de la sviso Claude Piron (1931-2008).





# Senpagaj novaĝgazetoj por labor-pendolantoj – revolucio en Eŭropo kaj en la svisa amaskomunikilaro

(Unua parto)

- *Andreas Künzli*

*Ĉi tiu prelego estis prezentita okaze de la 1-a Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Jŭrnalistoj, la 28an de majo 2008 en Vilno (Litovio). La prelego estas provo trakti neesperantan temon per Esperanto.*

## Enkonduko

La liberecoj de informado kaj esprimado estas esencaj elementoj por la libera formado de la opinio entute. Ĉi tiuj liberecoj estas garantiataj de la svisa konstitucio.

Nature mi pensas pri la veraj liberecoj kaj ne pri la pseŭdo-liberecoj, kiel ili eble en iuj landoj estas formale garantiataj, sed ne vere efektivigitaj, nek aplikataj-praktikataj.

Kiel Audrys Antanaitis ilustris en sia interesa prelego, la gazetaro de Litovio ŝajnas troviĝi ankoraŭ malproksime de altnivelaj standardoj rilate la kvaliton postulatan.

Konsiderante la fakton, ke la okcidentaj landoj havas pli longan sperton en la produktado de gazetaro kaj amaskomunikilaro, la post-komunismaj orienteŭropaj landoj rapide «lernis» de ili, sen esti transirintaj la saman lernoprocezon. Per tio ili eble kopiis nur supraĵe la «valorojn» de la okcidenta

sperto, sen ke la popoloj povis reale vivi ilin dum relative longa tempo. La rezultoj el tio estas ĝuste tiaj, kiel Audrys klarigis.

Se oni vizitas kioskon en Litovio, oni konstatas, ke la nivelo de la loka gazetaro neniel kongruas kun tiu ekzemple en Svislando, Germanio aŭ Francio. Oni ankaŭ tute nenie trovas alilandajn gazetojn, kio signifas eĉ pli drastan limigon de la informhorizonto. Kaj nur malofte kaj en specialaj vendolokoj oni trovas gazetojn en aliaj lingvoj, kaj la redakcia nivelo ekzemple de pollingvaj gazetoj estas mizera. Ŝajnas, ke en Litovio, kiu cetere estas ege provinc-eca kaj maldense loĝata lando, la popolo informiĝas ĉefe tra la radio kaj televido pri la aktualaj eventoj, dum la gazetaro estas pli malpli neglektebla aŭ ignorebla, eble kun malmultaj esceptoj. Certe la interreto, kiu disponigas kelkajn respektindajn informportalojn (ekzemple *delfi* por la baltaj ŝtatoj), plenigas la vakuon. En kiu grado la litovoj interesiĝas pri internaj kaj eksteraj politikaj aferoj kaj pri aktualajoj el eksterlando, estas alia demando, kiun mi ĉi tie ne povas kaj ne volas respondi. Krome, la litova politiko ĉefkoncentriĝas pri relative malmultaj temoj kaj personoj, do estas neniel komparebla kun tre kompleksa lando kiel Svis-



lando, kie treege multaj diversaj politikaj, sociaj kaj ekonomiaj fortoj kunludas. Ĉiuj tiuj aspektoj ludas gravan rolon por la stato de gazetaro. Sed la litovia situacio ne estas la ĉefa temo de mia traktaĵo.

Por la efektivigo de tiuj liber-ecaj rajtoj gravas interalie la posedo de konvena infrastrukturo, kiu ebligas al la produktantoj de informoj ilin povi disvastigi libere, aktuale kaj vaste. Nur laŭ tiu kondiĉo estas eble, ke ene de limigita tempolimo la plureco de interesoj kaj opinioj povas esti publike komunikata, prezentata kaj klarigata, por reale kontribui inter alie al la politika opini-formado (sed sub la impreso de la skandalgazetaro tiu ĉi koncepto eble estas eksmodiĝinta aŭ endanĝerigata). Apud radio, televido kaj interreto la presita gazetaro estas parto de tiu infrastrukturo.

Kompare kun sia grandeco aŭ malgrandeco kaj sia nombro de enloĝantoj, Svislando estas – aŭ estis – lando kun relative multaj gazetaj titoloj. La teritorio de Svislando estas 41 285 kvadratkilometrojn granda, kaj la lando havas 7,6 milionojn da enloĝantoj (do ĝi estas multe malpli granda ol ekzemple Litovio, sed havas multe pli da enloĝantoj.)

Ekde la 1930aj jaroj la nombro de gazetaj titoloj (mi parolas pri la aĉeteblaj aŭ aboneblaj gazetoj) reduktiĝis de 400 al la duono en la jaro 2006. Aliflanke ĝis en la dua duono de la 80aj jaroj la tuta eldonkvanto de la aĉeteblaj ga-

zetoj duobliĝis kaj atingis 4 milionojn da ekzempleroj. En ĉi tiu konsidero ne temas pri oficialaj bultenoj, fakĵurnaloj aŭ membroligiloj. Do ĉe ŝrumpanta nombro da titoloj estas konstata kreskanta nombro de la eldonkvanto. Tamen komence de la 90aj jaroj la averaĝa ĉiutaga eldonkvanto de la aĉeteblaj gazetoj transiris al mal-kreskanta tendenco, restante stabila ĝis nun.

Do la gazetara pejzaĝo de Svislando troviĝas en konstanta ŝanĝiĝo. Oni povas paroli pri kruela lukto de la gazetoj je pluekzistado. La kialoj estas kompleksaj, certe havas ion komunan kun la ŝanĝiĝantaj kutimoj de la konsumantoj, kun la treege kaprica labormerkato, la revolucia interreto kaj la liberaligo kaj satigo de la merkato per sennombraj produktoj. (La kutimoj ŝanĝiĝis laŭ la sekva ironia anekdoto, kiun donis ĵurnalisto de Neue Zürcher Zeitung [NZZ]: «Pli frue oni aĉetis ĉe la kiosko cigaredojn kaj la gazeton *Blick*, hodiaŭ oni estas nefumanto kaj legas senpagan gazeton...»)

Do enkadre de tiu ĉi ĝenerala skizo de la situacio tiuj makrosociaj kialoj ne povas esti detale analizataj. Mi volus nur aldoni, ke la gazetaro en Svislando en la unua duono de la pasinta 20a jarcento konsistis el grandnombro da malgrandaj, regionaj aŭ lokaj gazetoj, kiuj estis ligitaj precipe kun politikaj grupintereso, do ekzemple katolika-konservativa,



aŭ liberaldemokrata aŭ socialisma-maldekstra kiel ĉefaj politikaj frakcioj, kiuj dominas la politikan pejzaĝon de la lando ĝis nun. Sed ĉi tiu situacio profunde ŝanĝiĝis, la politika ligiteco de la svisa ĉiutaga gazetaro preskaŭ malaperis aŭ restas spure sentebla en la senpolitikigitaj gazetoj. La nova koncepto estas trans- aŭ superregiona, sed ĝi perdis sian unuflankan partipolitikan fokuson same kiel perdiĝis ankaŭ la ĵurnalisa konkurenco inter diversaj iam memstaraj gazetoj.

Bedaŭrinde, kun la kreskanta populareco de skandalĵurnalismo kaj la drasta ekonomia premo leviĝis ankaŭ en Svislando la demando, ĉu tiu ĉi metio povas esti konsiderata ankoraŭ kiel serioza. Nu, ĵurnalistoj ekzistas bonaj kaj malbonaj, sed Svislando certe apartenas al tiuj landoj, kiuj disponigas pri sufiĉe serioza kaj alt-nivela amaskomunikilaro, laŭ diversaj kriterioj. Mi ne povas ĉi tie analizi unuopajn ekzemplojn.

Alia grava fenomeno de la lastaj jardekoj estas la kunfandiĝo de iam memstaraj ĉiutagaj gazetoj. La rezulto de tiu evoluo estas, ke aperis novaj regionaj gazetoj kun sama titolo, kiuj enhavas komunajn partojn (ekzemple rubrikojn pri eksterlando, Svislando, ekonomio, kulturo aŭ sporto), sed kiuj enhavas memstaran parton kun artikoloj pri la lokaj okazaĵoj. Ĉi tia koncepto promesas koncentron de la resursoj (informoj, anoncoj, infrastrukturo). Ekzistas ankoraŭ

alia modelo nome por pli malgrandaj gazetoj establiĝi, apud grandaj ĉiutagaj ĵurnaloj, kiel dua gazeto kun du- ĝis trifoja aperritmo en la semajno kaj kun fokuso al priloka raportado. Ekde kelkaj jaroj ekzistas ankaŭ la ĝis nun sukcesa modelo de la dimanĉa gazeto, kiun konkurence lanĉis diversaj grandaj eldonejoj.

### **Senpagaj novaĵgazetoj por labor-pendolantoj**

Kun siaj tradicie granda nombro de laborpendolantoj, Svislando estas konsiderata kiel tre taŭga merkato por senpagaj gazetoj por tiu speco de klientoj.

En Svislando aperas diversaj specoj de senpagaj gazetoj. La plej tradiciaj inter ili kun la plej granda eldonkvanto estas eldonataj de du grandaj var-distribuantoj, nome la kooperativoj Migros kaj Coop. Iliaj gazetoj aperas unufoje semajne en eldonkvanto de po unu miliono da ekzempleroj kaj estas distribuataj al ĉiuj membroj de la kooperativo respektive al la klientoj, kiuj posedas la karton Cumulus.

La dua kategorio de senpagaj gazetoj koncernas la tradiciajn anonc-gazetojn, kiuj limiĝas al regiono kaj kiuj atingas ĉiujn loĝejojn senpage, plurfoje en la semajno. Iliaj eldonistoj estas diversaj eldonejoj. Laŭ moderna koncepto ĉi tiuj gazetoj reprezentas miksaĵon de redakcia parto kaj anonco-parto. Kelkaj el tiuj varb-



anonco-gazetoj deklaris sin, pro la alta eldonkvanto, plej grandaj gazetoj de la regiono.

Finfine mi alvenas ĉe la kerna temo de mia prelego. Kiel alia grava ennovaĵo en la merkato de la ĉiutaga gazetaro aperis ekde la jaro 2000 la senpaga novaĵgazeto, kiu estas destinita precipe por la labor-pendolantoj. Labor-pendolanto estas nomata persono, kiu loĝas en punkto A kaj laboras en punkto B kaj kiu cirkulas inter tiuj du punktoj. Povas esti du punktoj en la sama urbo, do la homoj legas tiun gazeton en la tramo aŭ buso; povas esti inter du diversaj urboj, ekzemple inter Berno kaj Zuriko aŭ Zuriko kaj Bazelo, do la homoj legas la gazeton en la trajno, kiu cirkulas ĉiujn tridek minutojn inter tiuj urboj. 900 mil personoj veturas en Svislando ĉiutage per trajnoj.

Ĉi tiu nova gazeta modelo, kiu originas el Skandinavio, kie ĝi daŭre estas sukcese praktikata (aparte interesa estas la ekzemplo de Islando), ekhavis ankaŭ grandegan sukceson en Svislando, precipe en ĝia germanlingva parto. La gazetoj estas distribuitaj frumatene de lundo ĝis vendrede kaj troveblaj en specialaj kestoj en publikaj punktoj, kie multaj homoj preterpasas, ekzemple antaŭ stacidomoj aŭ bus- kaj tramhaltejoj. Do la distribuado funkcias laŭ la principo de la memservado.

En la jaro 2006 ĉi tiu gazeta tipo atingis 30 % de la loĝantaro ekde la 14a vivojaro. Ĝi estas laŭ

enketoj alloga precipe por publiko, kiu ne aĉetas aŭ ne abonas gazetojn aŭ kiu havas pli malaltan lernejan kleron (objektive). – Mi do prezentu la kvar senpagajn gazetojn por pendolantoj, kiuj lastatempe furoris en Svislando.

### **20 min (20 minuten) / Tamedia**

*20 min* estis fondita en 1999 de la norvega eldonejo Schibsted. Ĝi sukcesis forpeli de la merkato la konkurenculon *Metropol*, kiu aperis inter 2000 kaj 2002 kaj kiu estis fondita de la sveda konzerno Modern Times Group. Ekde 2004 *20 min* estas la plej forta taggazeto el vidpunkto de eldonkvanto kaj nombro de legantoj (1 244 000). Ekzistas lokaj redakcioj en Zuriko, Berno, Bazelo, Lucerno kaj St.Gallen.

Ekde 2005 ĝi estas posedata de Tamedia (kiu eldonas i. a. *Tages-Anzeiger*). Svislande ĝi estas distribuata per 3800 kestoj en publikaj lokoj kaj per aldonaj 900 kestoj ĉe trafikhaltejoj. Kompare kun ĉiuj ceteraj taggazetoj *20 min* atingas la unuan lokon. Ĝia publika atingeco estas ĉ. 30 %.

En Romandio *20 minutes* ekaperis la 8an de marto 2006 post fiaskitaj intertraktoj kun la eldonejo Edipresse, kiu tie lanĉis kvar monatojn antaŭe sian senpagan taggazeton *Le Matin Bleu*. *20 minutes* havas nuntempe jam 390 000 legantojn. Ĝia interreta adreso: <http://www.20min.ch>.

(*Sekvo en la venonta numero.*)





# Svisa kalendaro

## Novembre

- 12 : Luzern : LES-Kunveno.  
15 : Chaux-de-Fonds : CDELI-SES: Tago honore al Claude Piron.  
27 : Basel : ESB-Kunveno.

## Decembre

- 6 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.  
10 : Luzern : LES-Kunveno.  
13 : Basel : Zamenhofa festo.  
13 : Lausanne : Zamenhofa festo.

## 2009

### Januare

- 5 : Lausanne : LES-Kunveno.  
7 : Luzern : LES-Kunveno.  
10 : Redakta datlimo de *SES informas*.  
17 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

### Februare

- 2 : Lausanne : LES : Ĝenerala Asembleo.  
7 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.  
21 : Chaux-de-Fonds: CDELI-Studsabato.

### Marte

- 2 : Lausanne : LES-Kunveno.

- 21 : Chaux-de-Fonds: CDELI-Studsabato.

### Aprile

- 4 : Chaux-de-Fonds: CDELI-Kultura seminario.  
6 : Lausanne : LES-Kunveno.  
10 : Redakta datlimo de *SES informas*.

### Maje

- 4 : Lausanne : LES-Kunveno.  
10 : Redakta datlimo de *SES informas*.  
15 : Chaux-de-Fonds : Ĝenerala Asembleo de la Amikoj de CDELI.  
16 : Chaux-de-Fonds : Ĝenerala Kunveno de SES, kaj Kunveno de la Esperanto-Amikaro de CDELI.  
25 : Feria periodo ĉe CDELI ĝis la 27-a de junio.

### Junie

- 29 : Rekomenco de la laboro ĉe CDELI.

### Julie

- 25 : Bjalistoko : 94a Universala Kongreso de Esperanto ĝis la 1-a de aŭgusto.

### Aŭguste

- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.

## Venonta redakta datlimo de *SES informas*: 2009 januare 10

La gvidantoj de la lokaj kaj fakaj societoj bonvolu atenti pri la venonta datlimo redakcia por la periodo januaro-februaro de la venonta *SES informas* 2009-1, kiu aperos komence de februaro. Ili informu pri la datoj de la kunvenoj por la monatoj februaro-majo kaj eĉ por la resto de la jaro. Kaj ili ne forgesu raporti pri okazintaĵoj. Antaŭdankas pro tiu redakta kunlaboro Claude Gacond, CP 480, 2301 La Chaux-de-Fonds. Rete: gacond@bluewin.ch